



Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista
 Unu numero : 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 25 FF
 Ĝiri al la poŝtkonto 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :
 Cercle amical esp. de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut

El la "Laŭtejo" :

Ĉiam pli 'laŭte'...

Ankaŭ en nia E-mikrokosmo, de tempo al tempo necesas "preni siajn birojn", eble modifi la orientiĝon, ĉefe kiam oni celas kiel eble plej bone respondi bezonon, nome por **Laŭte!** kaj ties **Broŝurservo**, de interhoma edukado per publikigo de tekstoj kaj interŝanĝado de ideoj. Plej zorge starigitan planon, asoci-statuton aŭ bulten-celaron, oni tamen iam kaj iam devas adapti al nova cirkonstancaro, eĉ eble tute forlasi, se intertempe malaperis la bazoj de ties starigo.

* Koncerne la broŝurservon, mi jam provis klarigi (en "Ĉu plu broŝurumi?" - L! n^o 53) la malfacilaĵon : amasiĝas stoko da broŝuroj asfiksianta la Laŭtejon pro ne sufiĉe rapida disvendado kompare al la senĉesa aperado de novaj tekstoj.

Kutime, en nia E-mondo plagas la monmanko. Por SAT-broŝurservo, almenaŭ nun, ne temas pri tio. Temas nur pri "produktado" (ĉu kvante ĉu enhave) ne tute adaptita al la "bezonoj". Ĉiukaze la "reto" de broŝurdisvendantoj (libroservoj aŭ unuop-

uloj) ne estas sufiĉa, kvankam ĝi senĉese disvolviĝas.

Mi do decidis iom bremsi la "kadencon de l' produktado", dediĉante la energion prefere al reeldonado de sukcese disvendebaj eldonaĵoj, ol al publikigo de novaj tekstoj, por kiuj ŝajne ekzistas nur malmulta interesataro. Venontaj eldonoj okazos ne plu "aŭtomate", sed nur se estos antaŭe garantio pri sufiĉa forvendo de la eldonota kvanto. Tiu eldonkvanto estos tiel fiksita, ke restu ne tro da stoko post sendado al la BS-abonantaro, al la libroservoj kaj eventuale al la memdisvendanta aŭ uzanta aŭtoro, frakcio, fako, ktp...

Materialo, kiu konsistigus nur etan broŝuron, eventuale aperos en L! (broŝuretoj malfacile disvendebblas), ankaŭ pli longaj tekstoj, kiuj pro sia enhavo povos aperi "felietone" (ekzemple nun : "Alvokoj al la homa konscienco" de J. PINJERO).

Samtempe la broŝurservo plu strebu redukti la stokon senutile kuŝantan en Laroque-Timbaut, dum eble estus interesatoj aliloke.

- Ĉiu do povas fariĝi broŝurdisvendanto en sia klubo, regiono, ... (vd. "Ĉu plu broŝurumi?...")

- Krome, mi nun speciale min turnas al ĉiuj gemalavaruuloj, kiuj donacis monon por la aĉeto de "Julia" :

Al tiuj la B.S. povas kompanse sendi ekvivalenton de la donacita mono per pakaĵoj de broŝuroj, kiujn ili mem provu disvendi (aŭ donaci, se ili tion preferas!).


... SED IOM MALPLI BROŝURE...

Plu funkcios tamen la sistemo de "monprovizado". En 1984 senteble kreskis la nombro de tiel pagantaj abonantoj : 100 (anstataŭ 80 en 1983). La provizo povas ja utili por pagi pluan abonadon al "Laŭte!", sendadon de jam aperintaj broŝuroj kaj kompreneble de novaj broŝuroj.

(daŭriĝo sur antaŭlasta paĝo)



Michel Challulau :



esperanto kaj erotiko

Aŭdanto, se vi estas pruda
Kaj naŭzas vin la amo nuda ...
... Pripensu bone antaŭ aŭdo
Tute ne estas mi altruda
Forĵetu min, retiru vin
Al via dika ŝel' testuda.

Aŭdanto ! Mi avertas due !
Ankoraŭ estas ne malfrue

Jes, se por iu erotiko ne estas plaĉo, tie ĉi ne estas placo por ĝi (pardonu, por li aŭ ŝi).

Mi avertas vin : mi nomos katon kato kaj do kacon kaco; tamen ĉar mi tute ne ŝatas la pornon, mi ne porke pornos kaj eĉ ne parolos kiel oni par-rolas (envere la temo de mia prelego estas erotiko kaj ne retoriko!)

Aŭdanto ! Jen la lasta voko !
Tuj sekvos jam danĝera loko !
Retiru vin ! Bedaŭrus mi,
Se vin mortigus nervoŝoko !

Neniu foriras, nu bone, ek al miaj tezoj, eble pli hipotezoj.

Mi hipotezas, ke Esperanto venkis, venkas, venkos, ĉar erotiko fondis ĝin, fundamentas ĝin kaj pli kaj pli kreas ĝin.

Jes ja, nek pro siaj lingvaj strukturoj Esperanto sukcesis, nek pro la ideologioj ligitaj al Esperanto, ekzemple la interna ideo aŭ la sennaciismo de Lanti, certe la du grandaj fortoj ene de Esperantio.

Sociaj, eksterlingvaj faktoroj ekzistas certe, sed tute ne donas klarigon pri tiu fakto : kial homo sin ligas al Esperanto ? Kial tiom da idiotoj, stultuloj, frenezuloj - ni ĉiuj - estas ligitaj al Esperanto ? Kial mi mem povas antaŭ vi deklari, ke senrevene mi estas katenita al Esperanto; al la lingvo ! ne al iu iom nebula movado.

Kial mi sciencisto, matematikisto - poste eble vi pensos, ke mi estas nur maten-mam-tikl-isto - nu kial mi hodiaŭ deziras esprimi mian mion tra E-o, kial do prismi miajn sentojn en E-o-prismo ? Kial do percepti mondon, bildigi mian menson pere de E-o ?

Kial do finfine racie sed pasie mi anas al la tiel nomata E-a familio - mi, sed eble vi ĉiuj ? eble ni ĉiuj ? ĉiuj ni ! Unu respondo mia : ĉefrolas erotiko !

*

Erotiko : la arto amori; erotiko : ĉio rilata al la amo de la seksa vivo sed erotiko : la emo homa al vivo, la seksa instinkto.

Universaleco de l' erotiko! bazo de universala lingvo, eble la nura !

*

Prave diras Marjorie Boulton :

"... Ne amo nur, sed eĉ amo estas forto de Naturo

Dezir' de kor' kaj karn' malsata ĝenas min, eĉ ŝokas
tre

sed el malforto fontas forto kaj la ŝtormo de pasio
la praelekto, sanktas strange; estas ĝi la energio
endratigebla, la Espero kaj la Fido kaj la Kre' !

jes, la Kreado post pasio ! sed kiu diris la samon, se ne Eŭgeno Miĥalski :

"Aspiras mi per spiro de l'pasio
elkrei novan mondon de la sonoj."

aliloke :

"Mi deziris tamen ankaŭ tion
pro dezir' mi brulis;
korpon korp' postulis,
Sed profani mi ne povis poezion
kaj en versoj mi forgesis la doloron
kaj en songoj kvietigis mian koron..."

Ĉu do kreo de poezio idas el deziro ? seksa deziro ?

Kion diras William Auld pri tio ?

"...Poemo estas masturbo
surogata kreo
kiu provizore malŝarĝas

la tro trudajn kojonojn

Poemo estas koito

kaj inverse

koito estas poemo..."

Tiel mi alvenas al mia unua hipotezo : erotiko fondis E-on. Eble iom malkonvene oni devas sin demandi : ĉu Zamenhof havis trotrudajn kojonojn ? Respondo mia : jes! Ekzemple, kial Zamenhof donis al E-o difinan artikolon. Zamenhof songis, ke li staras kun viroj, diskutantaj pri grava plago, kiu okazus, se tri ruĝaj knabinoj elirus el arbaro. Subite tri ruĝaj knabinoj aperis kaj la viro ekkrio :

"jen **la** tri ruĝaj knabinoj"

Mi lasas tiun songon al psikanalizisto, sed gravas miavidpunkte la koloro ruĝa, ĉu ĝi ne estas simbolo de amoro ?

Kaj "Fajron sentas mi interne

Vivi ankaŭ mi deziras

Io pelas min eterne

Se mi al gajuloj iras

kaj

"Ho mia kor' ne batu maltrankvile"

kaj

En songo principon mi vidis

Sub arbo sub verda mi sidis

Tenante ŝin koro ĉe koro

Tre prave Kalocsay diris, ke Zamenhof, tuj post la naskiĝo de E-o, fianĉiĝis al la poezio. Kaj Kalocsay aldonas: "Kaj vere, oni povas diri, ke ne per E-o Zamenhof faris poezion sed per la poezio li faris E-on. Oni povas diri, ke la tuta E-o estas poezia lingvo."

Imagu Zamenhof songantan pri principo, li tenas ŝin ĉe koro (ĉu mamenmane, pardonu : manenmane) li deziras, ke la sonoj de E-o povu doni ekzakte la senton pri tiu amo iom romantika, eble sublimigita, kiun en la tiama epoko tre pruda li ne povis sperti kaj eĉ inter "gajuloj". Ĉu ne Zamenhof mem, kiu deklaris : "Mi provis iafaje min distri en la societo, sed sentis min ia fremdulo, sopiris kaj foriradis kaj de tempo al tempo faciligadis mian koron per ia versaĵo en la lingvo prilaborita de mi" ? Ĉu tio ne kongruas kun la diro de Miĥalski :

"en versoj mi forgesis la doloron"

Kial do Zamenhof kaj Klara korespondis esperantlingve ? Kial do edziĝo kaj samtempa apero de E-o ? Ĉu ne Klara, kiu enmetis en E-on tiun vivon ? Nur tiele oni povas kompreni, kial Zamenhof ĉiam parolis ne pri logiko sed pri

fleksebleco de la lingvo, vivipoveco, bonsoneco, sonoreco, agrablo, natureco... Antaŭ ĉio li volis traduki la plej fundamentan econ de l' homo : la deziron. Se li povis traduki tion, ĉio sekvas. Li sukcesis ! Jen lia genio !

Poste, poeto povas vorti tiel per la vortoj forĝitaj de Zamenhof :

...kvazaŭ tertremo, trombo, katastrofo

natura, senaverte la Deziro

invadis min... Ho tiroj ho tifonaj

Ho fendo, kirlo, elradika ŝiro !

Deliro ! Tondro en la gorĝo. Vipoj

fulmaj sur miaj ŝultroj

... ĉiu karnoĉelo kriis

la tuta mio vian korpon volis

pasie premi...

kaj subite la Dezir'

trafulmas mian nervmaŝaron, ruĝaj ĉeloj karmanjolas

la histoj min perfidas mi ruĝiĝas mia ŝtorma spir'

hontigas min... mi tordas min, mi turmentiĝas en delir'

(en haroj, ostoĵ, sur la haŭto, lia virĉeesto ventas)...

Kiam lingvo tiel radikas en la profundo de la memo, tiel bone tradukas la netradukeblan, kiam la mio mias plej sincere, pli nature kiam nia nio sin esprimas plej spontane en tiu lingvo, kiu povas nin malligi de ĝi ?

Kaj eble nun vi komprenas la kialon de mia prelego, eble nur kiel Eŭgeno Miĥalski :

"en koŝmaro de nokto, kun stranga amem"

mi ekamis min mem"

Kaj antaŭ vi, mi diras mian koŝmaron. Sed tiun koŝmaron mi travivis reale.

"La volupto mian korpon skuis

Kiskaresojn mi plenĝuis"

Ja *"Mi komprenis grandan sakramenton*

sakramenton de l' naturo"

Sed ĉio okazis en E-o ; do mi tute povas konfesi al vi, ke mia gepatra lingvo pri erotiko, amoro, amo, religio, estas Esperanto. Jes : ŝi ne konis mian lingvon kaj mi ne la ŝian. Do inter ni du nur E-o.

Kiam kelkaj diras, ke la vortoj esperantaj estas ne elvokivaj, mi ridetas : ankoraŭ stultulo ! Por mi ili posedas tiujn travivaĵojn miajn, ili vivas en mi kun sencoj plenaj je ĝuo, je ĝojo, je plezuro, je doloro; unuvorte E-o estas duono de mia mio pere de erotiko. Sed bone pripensu : se oni komprenas iom pri la seksuniĝo, pri la seksrilatoj, se oni povas

fundamente, ĝisfunde konscii pri tiu natura emo al amoro, tiu risorto de la vivo, oni iomete senvualigas sekreton de ni mem, de la universo, de la senco de morto kaj vivo.

Ankoraŭ Miĥalski bone skizas tion :

Golgotas la vivo

Du krucoj

ŝi kaj mi.

Eĉ se nur por tiuj kelkaj vortoj, indas studi E-on. Tre trafe Miĥalski prezentas nian sorton.

Pasiono de la Pasio.

Krucoj : ĉu ne la krucoj dismetitaj por ricevi la lancon, kiu sangigis ? Sed jam de erotiko mi alvenis al mistiko. Ŝi kaj mi ! Pripensu ankoraŭ ! Vidu la ligojn inter erotiko kaj lingvo : ambaŭ biologiaj faktoj sed tuj ekde la komenco sociaj faktoj. Ĉu necesas emfazi, ke nepras du homoj por erotiki ? kaj por komuniki lingve ?

Ĉu ekzistas rilatoj inter semo kaj semantiko ? Ĉu sperm-elĵeti kaj vortelĵeti ne samas por viro ? Kia ligo inter kopulacio kaj kopulo, do inter biologio kaj gramatiko ? Kaj denove ŝi kaj mi ! Ĉu ŝia lingvo samas mian lingvon ? Jes, tie kuŝas problemo : ĉu identas virina lingvo kaj vira lingvo ? precize ekzemple, ĉu tempoj tute egalas por viro aŭ virino ? Ĉu ina tempo lune monatas ? ĉu virtempo rekte erektiĝas de l' paseo al futuro ? Kiel granda penis ! Ĉu estas ĝi la akso de l' universo ĉirkaŭ kiu naturo koite kunĝuas kreive ?

Jen denove mi alvenas je tiuj grandaj mitoj de l' homoj. Esperantprisme :

"Sur la akso de la as de la is al la os

ĉu inas ine naturo por idi erojn de nia nio ?"

Mi tute ne povas respondi al tiom da ĉuoj. Oni sin lacigas tiel ĉui eble malsaĝe !

Sed mi tiamaniere ektuŝis la trian hipotezon : erotiko kreos E-on.

Ni jam vidis, ke erotiko estas bazo de la poezio kaj kiu diris, ke verki bonstile estas kiam "vortoj arte amoras"? Retralegu poemojn de niaj esperantaj majstroj Kalocsay, Auld, Boulton, kaj aliaj. Certe venos aliaj poetoj inter ni por poluri nian lingvon, sin esprimi pere de E-o, ĉar erotiko ĉiam estos. Eble ? Ĉu ne ?

Kaj homo povas bone ĉeesti en esperanta erotiko. Jen kelkaj flankoj de tiu hejmeniĝo en nia lingvo, estas ĝiaj semantikaj valoroj. En E-o ne tabuaj asocioj en la vortoj, do tre libere oni povas paroli pri sekso. Mi tre dubas, ĉu

en E-o ekzistas tiuj maldecaj asocioj, iom pornaj, porkaj, kiel en la franca lingvo aŭ la angla, rusa, ktp. Paroli france pri sekso estas neebla aŭ nur kiel kuracistoj. Kiom da vortoj por peniso, sed ĉiuj kun truda asocio al nebelo, al honto, al nedeco... La esperanto-vorto kaco estas home neŭtra. Pensi E-e pri amoro, sekso, liberigas nin de ĉiuj malŝata, mal-laŭda, religia, pruda tabuoj. Pri piĉo same; imagu, ke tiu vorto en franca lingvo estas la plej uzata sed kun sencoj treege malbelaj, malgustaj, kaj maljustaj por virinoj, eble malamaj eĉ !

Do almenaŭ por mi tiu nuntempa liberigo de la sekso okazis pere de E-o post spertoj evidente ! Kaj ĉu vi sentas la poeziemon de vortoj kiel "piĉetolino ; piĉulineto", ĉu ne troviĝas en tiuj vortoj sonasocioj belformaj, gustiĉaj, amplenaj, sukfluaĵaj ?

Tamen manko estas en E-o. Klitorio estas tro fakula vorto, iom plumba. Tiklilo pli bone konvenas. Sed tute aprobas mi novan vorton **tliko** kaj se virinoj bonvolas adopti tiun vorton meze de la Jardeko de l' virino, mi esperas, ke la ĝisostaj Fundamentuloj plejparte nur viroj ne kritikos tiun neologismon.

"tikli la tlikon" ; fingri sian tlikon", ĉu ne bone ?

"tlikleki", ĉu ne elvokiva ?

Sed nun tre tiklema dorna problemo : jes, meze de Jardeko de l' virino mi kuraĝas proponi uzon de vorteto **ĵi** kun la signifo **li aŭ ŝi**.

Precipe en tiu jaro dediĉita al batalo kontraŭ diskriminacio, kial ne forĵeti for de nia lingvo tiun diskriminacion fare de la viroj kontraŭ virinoj kiam oni uzas "li", eĉ kiam oni deziras paroli pri "li aŭ ŝi" ? Kial ne povas ekzisti en nia lingvo tiu nova vorto foriganta la seksismon de E-? Kiai homo estas "li" ? Kial, parolante pri homo, mi devas ĉiam diri : "lia" emo al erotiko. Ĉu virinoj ne emas erotiki? Pli bone estus diri : "lia aŭ ŝia emo", sed iom strange kaj peze, ĉu ne pli simple diri nur : "ĵia emo erotiki" ?

En kelkaj landoj nun ekzistas leĝoj por starigi egalrajtecon inter viroj kaj virinoj (inter iĉoj kaj inoj). Ĉu E-devas postlami ĉiun revolucion ? Kial do niaj esperantistinoj ne avangardas proponante tiun vorteton, aŭ ĉu ili deziras por ĉiam esti mamsubmetitaj - pardonu, memsubmetitaj - al viroj ?

Ne diru al mi : "Fundamento" !

E-o estas kreo de la volo de homoj. Neŭtra fundamento

do neŭtra rilate al seksoj !

Kiam homo ne plu elvokas "li" sed "ĵi", tio estas "li aŭ ŝi ; ŝi aŭ li", eble antaŭenpaŝo al justo, ne plu tiu virismo (eble penis-ismo) regos sed nur homaj interrilatoj.

Mi atencas al la lingvo, eble perfortas ĝin, sed ĉu la lingvo ne perfortas nin, eble almenaŭ nur min ?

Tra lingvo fluas ideologio; estus bone iom bremsi la seksisman ideologion en E-o. Eble tro draste mi tuŝas al niaj okcidentaj pensmanieroj. Senseksa pronomo ŝokas nin okcidentulojn, do kaŭze de tio indas kaj endas meti ĝin en E-o. Virinoj, al vi la parolon !

Atentu bone : diferencoj ekzistas inter "ŝi" kaj "li" kaj ili devas pluekzisti sed socie estas alia afero, tie estas dominantoj kaj dominatoj kaj justeco devas regi.

Neniam forflugos de mia mio tiuj versoj :

Golgotas la vivo

Du krucoj

ŝi kaj mi

Sed en la sociaj bataloj nepras sekse neŭtra konduto, tie regas pli etiko ol erotiko, pli racio aŭ pasio, pli logiko ol poetiko. Kaj etiko, racio, logiko altrudas al mi la uzon de tiu neologismo "ĵi". Jes, tie Boulton pravas :

..."Se vi min kiskus eĉ per cent

perfektaj kisoj, la turment'

de l' nuna mondo daŭrus.

Ja, ni ne devas forgesi pro erotiko la eksteran al ni mondon. Relegu "Metropoliteno" far Varankin ! aŭ la poemojn de Auld !

Kaj nun pri la estonteco : Auld mezuras junecon per kapablo erotiki :

"Ĉu venos tempo kiam mia spiro

ne plu ravite kaj dolore haltos

pro la malkovro de virina nudo ?

Kiam ni ĉiuj flankenlasos erotikon, eble E-o mortos. Aŭ kiam virino alpaŝos al mi, dirante kiel en "Vojaĝo al Kazohinio" :

"vekiĝas mia deziro kaj ankaŭ krome mi devas ankoraŭ naski du infanojn. Ĉu vi estas kapabla por seksa laboro?"

Tiam arto amori estos nur ŝtata, laŭleĝa. Ĉu vere estos ankoraŭ arto amori, arto krei laŭ la seksa instinkto novan mondon ? Tiam mi relegos el Kurzens :

Ĉu tio do la viv'? Ne, ne! Neeble!
Ankoraŭ devas, devas io veni
Ankoraŭ devas fajri vera tago
Ankoraŭ devas nigri vera nokto.

Al ni apartenas tiu arto fajri, nigri, dolori, deliri, spasme spiri, orgasmi.

Ĉu nur en banalo devas ni vivi ?
prefere en la karna valo !

Mi fidas je la esperantistaro, jen bela eta popolo, kiu naskis tiujn proverbojn trafajn, esprimoplenajn :

Tia kaco, tia virino.
Kiu penis, penis, la boron ne ĝuas.
Se okulo ne vidas, kaco ne avidas.
Spermo saĝon akriĝas.
Sperta piĉo ne restas sen kaco.
Kaco majesta sed cerbo modesta.

Ja, tiu popolo vere komprenis, ke por bone kontakti, necesas interne idej. Nur pere de la erotika senco mi povas kompreni tiun "internan ideon". Tio estas interne intervjui!

Denove poeto diras :

Nun kun varma buŝ', amik'
Iru do en paco
Ĉar en tia erotik'
ja troviĝas graco.

Jes, graco, paco : kristanaj vortoj, dia dono, sankteco.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj
Sed dissaltos la obstinaj baroj
Per la sankta amo disbatitaj.

Tie ĉi sankta amo estas tiu graco, sed ĝi fontas el erotiko !

Do eble nun vi komprenas, kial mi proponis prelegi pri tiu temo !

Sed finfine devas mi ankoraŭ diri, ŝpruce vorti, poemi pri rilato inter erotiko kaj lingvo ! Kiam supraĵe oni lernas E-on, nenia ĝuo ; iom ĥaose, bordeleske! nur teknike : listo de vortoj, gramatikaj reguloj.

Sed iom post iom oni malkovras jen gracion, tie svelton, ĉi tie ventron virge platan, pli alte ŝvelan bruston.

Sed nun fajno de l' linio; subite elstaras malvokoloraj cicoj ; jen delikataj molaj formoj, ĉefas la belo en la lingvo.

Nun interkrura intimo ; ĝuo-fontano.

Kaj ni vidas, sentas nur la supraĵan strukturon de la lingvo.

Avide la profundan, la kernan! templon viziti!

Kaj jen ni rimarkas, ke la lingvo en niaj manoj ricevas sian propran vivon. "La parolo fluas jam mem flekseble, gracie kaj tute libere."

Jes, tiuj membroj traplektitaj, tiu dia diega korp-fandiĝo, tiu lulo freneza, tiu sveno, tiu ardo, viaj krioj de volupto, tiuj amluktoj...

Kaj nun glite, glate, giute
manoj al viaj pufŝvelaj mamoj
mi profunden en vin
vi spasme
vi baŭme diskurre
ni du unu !

Golgotas la vivo
Du krucoj
Esperanto kaj mi

NI kaj ESPERANTO !

Michel Challulau.

Facilaj KRUCVORTOJ de Kribo

(r = nur la radiko!)

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1									
2			■						■
3			■						
4						■	■		
5					■				
6		■		■				■	
7									■
8									

Horizontale : 1. Rezina gumo. 2. Komenc-literoj de kunaŭtoro de "Angla antologio"; Montara remaĉbesto. 3. Participa finaĵo(r); Forigu la vokalon! 4. Seke soni; Prepozicio. 5. Komence ; Por tro ĉifebla kolumo. 6. Komplete (r). 7. Longe ekzameni (r). 8. Konformaj.

Vertikale : 1. Ridinda. 2. Pikema planto (r); Fonetike : Natura haveno. 3. Nek tie nek ĉi tie. 4. Ekposedi (r) ; Akompanas Stafeton. 5. Duonefika (r). 6. Inklini;

Kun nazo malpura. 7. Floro (r); Tabelo (r). 8. Korelativo ; Prepozicio. 9. Animaj speguloj.

(Novaj enigmoj estas bonvenaj por venontaj numeroj. Dankon!)

APERIS EN 1984 :

Sennacieca Revuo 1984 (eld. : SAT, Parizo)

Tiel aspekte kiel en have "Sennacieca Revuo" restas unu el la plej ŝatindaj E-revuoj. Ĉiujare SAT publikigas en ĝi tekstojn de prelegoj, relative longajn kontribuojn, kiuj ne povus aperi en "Sennaciulo" kaj kiuj ja meritas vastan diskonigon ne nur al la asocia membraro. Prave la red. lokis unuavice la pripensojn de Marjorie BOULTON pri "La kompleksa tragedio de Norda Irlando", sed ne malfortiĝas la intereso en la postaj paĝoj, kiujn uzas Klodeta CHEBER, kun kiu ni konatiĝas kun "Tri pionirinoj de la laborista movado", supozeble la unuaj el longa serio. Ni atingis 1984. Bert DE WIT prezentas al ni Georgon ORWELL kaj aparte interesiĝas pri "Novlingvo", tiu "Mal-Esperanto" uzata en la romano "1984". Sed la tuj postaj kontribuoj, konfidencoj de ĉeĥoslovaka kamarado kaj pripensoj de AZMA pri "Krea spirito", memorigas al ni, ke ofte fikcio ne estas malproksima de realeco... Ni danku ankaŭ al amiko Marcelo REDOULEZ, kiu tiel detale priskribis la Bordoan regionon, kie ĉi-jare okazis la SAT-Kongreso.

Resume, nepre legenda kajero, mendebla ĉe SAT, 67 avenue Gambetta, F 75020 PARIS, kontraŭ 26 FF.

Pensoj kaj Protestoj, senryŭ de Feiko MUNNIKSMa, kun sumi-ilustraĵoj* de Pierre GABORIT (Eldonejo Perspektivo, Nørregårdsvej 91 DK 2610 Rødovre). Prezo : 20 FF (Laŭte peras la mendojn).

Ne nur ĉar F. Munniksma estas laŭtulo, sed ĉar lia talento estas granda kaj trafa, ni atentu la libreton, kiu ĵus aperis ĉe Eld. Perspektivo.

"Senrio" - afable informas la aŭtoro - laŭforme similas la hajkon, sed havas alian spiriton, en kiu ĉiam estas loko por la homo. Per tre malmulte da vortoj zorge elektitaj Feiko Munniksma senkompatate, sed seniluzie, vipas la homan socion, ties maljustaĵojn, ties abomenaĵojn, resume la ĉie regantan absurdon. Jen temoj, kiuj ne povas lasi indiferentaj la liberamantojn svarmantajn en la laŭtularo ! Ĉiu "senrio" estus citinda, sed frandu jam kelkajn, antaŭ ol decidi pri mendo de la tuto !

Homa agreso Pli-pli-pli-voĵo,
por naturo kaj besto flamfebra industrio,
Dachau sen ĉeso kresko-idolo

Ne proteino, De subpremato
milionoj mortaĉas al subpremanto : tre kurta
babil' kun vino fatala pado

Tiujn du lastajn vi ne trovos en la libreto. La aŭtoro donacas ilin al la gelaŭtuloj :

Papo kaj mito La generalo :
kaj banko. Por kredemul' atombomb' pli ĉipas ol
sankta spirito soldat-batalo

12

* sumi-e : japandevna tuĉpentrado.

Sendinto : koordinatoj
de la PERSONO,
aŭ stampo de la ASOCIO

Grupo

" **"KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO"**
Alvoko pri via aliĝo al nia universala grupo de personoj kaj asocioj aktivantaj por starigi : **Universalan Kodon de Scienca Deontologio, supernaciajn servojn de sciencaj rekomendoj kaj decidoj, kaj Universalan Kortumon.**

Ni, INDIVIDUOJ, sciencistoj aŭ ne-sciencistoj, persone agantaj, aŭ ASOCIOJ*, opinias, ke ĉiuj civilizacioj suferas pro malutiloj ofte gravaj, kaj travivas gravajn riskojn sanitariajn, sociajn kaj politikajn, je mallonga, meza, longa aŭ tre longa templimo.

Laŭ ni, parte la kaŭzoj de tiuj malutiloj kaj riskoj estas jenaj : 1) la libereco lasata al la sciencistoj labori por la bono aŭ la malbono, pretekste, ke la scienco estas senkulpa kaj, ke ne eblas haltigi la "progreson" ; 2) la akaparo, por la bono aŭ la malbono, de fundamentaj aŭ aplikataj esploroj, malkovroj aŭ inventaĵoj, eĉ malnovaj, fare de korpaj aŭ moralaj personoj: "decidantoj" = regantoj, disponentaj trudajn povojn kontraŭ la individuoj.

La scienco, universala ĉar ĝiaj leĝoj aplikiĝas en ĉiuj lokoj kaj tempoj, la ega potenco de kelkaj regantoj de la prirespondantoj de iuj naciaj kaj multnaciaj entreprenoj, estroj rektaj aŭ peraj de milionoj da personoj, la ega potenco de iuj modernaj rimedoj malutili al milionoj da individuoj, devigas nin havigi al nia alvoko universalan eĥon kaj proponi protektajn rimedojn, kiuj transiras la limojn de niaj propraj nacioj.

Kvankam la difinoj de la bono kaj de la malbono estas plej ofte sociaj kaj cirkonstancaj, ni opinias, ke estas dezirinde, eble kaj eĉ necese fiksi ilin per komuna akordo kaj laŭ universala spirito. La malbono signifus, en tiu ĉi alvoko, la malutilon aŭ/kaj la riskon truditajn de aplikoj de iuj

* Asocioj, laŭ ni, estas ĉiuj ajn grupoj : asocioj, kooperativoj, sindikatoj, deklaritaj aŭ ne, strukturitaj aŭ ne, zorgantaj ununure aŭ precipe, aŭ akcesore pri problemoj rilate la aplikojn de la sciencoj.

sciencoj al individuoj aŭ grupoj de individuoj (triboj, etnoj, popoloj, ktp) kontraŭ aŭ ekster ilia volo aŭ kun ilia konsento akirita pro tendenca informado, rekte aŭ pere (ekzemple agante sur la homan medion). La bono signifus, kontraŭe al la malbono, la kontrolitan foreston de tiuj malutiloj kaj/aŭ riskoj.

Ni opinias, ke urĝegas tiri instruojn el tiuj konstatoj kaj ni petas vin pripensi jenajn proponojn koncerne la rimedojn por : 1) helpi la sciencistojn, kiuj rifuzas labori por la malbono 2) malhelpi la sciencistojn labori por la malbono; 3) subteni la "decidantojn", kiuj rifuzas labori por la malbono ; 4) malhelpi la decidantojn uzi riproĉinde esplorojn, malkovrojn, inventaĵojn, eĉ malnovajn.

Tio ĉi ne signifas, ke la sciencistoj aŭ la decidantoj aplikas ĝenerale la malbonon pro la malbono. Plej ofte, malkovro aŭ inventaĵo okazas hazarde aŭ pro laŭdindaj motivoj. Kio povas esti riproĉinda, tio estas la uzado farita aŭ eble farota el tio, tuj aŭ iam poste, pretervole aŭ konscie, daŭre aŭ nedaŭre.

En la nuna etapo de niaj pripensoj, ni proponas tri ĉefajn rimedojn, antaŭe akceptante, ke vi proponos aliajn, same aŭ pli valorajn.

I. La unua rimedo estus la starigo de **UNIVERSALA KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO**, difinanta la moralajn regulojn pri la uzo de la sciencoj fare de la sciencistoj kaj decidantoj por, en ĉiuj landoj, sekurigi individuojn kontraŭ la malutiloj kaj la danĝeroj de la sciencaj aplikoj, eĉ se tiuj aplikoj okazas en aliaj landoj ol tiu, kie vivas la homoj suferantaj aŭ riskantaj suferi pro tio. Tiu kodo estus aplikebla al ĉiuj sciencistoj, diplomitaj aŭ ne, kaj al ĉiuj decidantoj. Ni precizigu, ke ĝi ne estus starigita - kiel okazas pri iuj naciaj kodoj pri deontologio - por fakte protekti la sciencistojn kaj la decidantojn kontraŭ la punaj persekutadoj, nek por permesi al la sciencistoj konstitui kaston izolitan de tiuj personoj, kiuj povas suferi pro iliaj laboroj, nek por permesi starigi kaston de decidantoj trudantaj siajn decidojn al la regantoj, sciencistoj, grupoj aŭ individuoj.

II. La dua rimedo estus starigi **SUPERNACIAJN SERVOJN PRI SCIENCAJ REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ** komisiitajn: - strikte apliki la universalan kodon de scienca deontologio,

- pristudi la novajn malkovrojn kaj inventaĵojn por kontroli ties konformecon al la kodaj preskriboj kaj tuj informi la sciencistojn en la tuta mondo,
- konstante provizi ĉiujn sciencistojn per la informoj ebligantaj al ili interrilatigi sian fakon kun sia scienco kaj la proksimaj sciencoj,
- konstante informi la decidantojn de la diversaj povoj pri rekomendoj kaj decidoj, kiujn ili mem faras, se tiuj ĉi povas influi al aliaj decidoj,
- publikigi siajn rekomendojn, siajn decidojn, kaj la decidojn postsekvantajn faritajn aŭ ne de la decidantoj,
- konstante permesi la transformigon de malkovroj, inventaĵoj, esploroj, en konkretajn aplikojn, interalie industriajn,
- limigi tiun transformigon al tiaj aŭ aliaj aplikoj,
- malpermesi portempe aŭ definitive iujn aŭ ĉiujn aplikojn de malkovro aŭ elpenso, kia ajn estas ĝia malnoveco,
- transsendi al la universala kortumo (vidi ĉi-poste) la dosierojn de la sciencistojn, kiuj rifuzas apliki la decidojn.

III. La tria rimedo estus la starigo de **UNIVERSALA KORTUMO**, rekte metita je la dispono de la individuoj, asocioj, registaroj en ĉiuj landoj, kiuj denuncas la malutilojn aŭ/kaj riskojn pri iuj aplikoj de iuj sciencoj. Tiu kortumo ekzamenas interalie ĉiujn petojn de sciencistoj koncernataj pro la decidoj de la supernaciaj servoj pri rekomendoj kaj decidoj. Tiu kortumo estus reprezentata laŭeble en ĉiu lando.

Ni invitas ĉiujn personojn interesatajn pri tiu propono, interalie la juristojn, partopreni en la redaktada komitato de la konstitua akto de tiu **UNIVERSALA KORTUMO DE JUSTICO**.

Tiuj tri ĉefaj rimedoj konsistigos - dum ĉiu el ili ne estos leĝoforta -, la precipajn celojn de la **UNIVERSALA GRUPO "KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO"**, kiu prezentiĝas kiel morala forto. Por la efektivigo de siaj celoj :

- la GRUPO organizos ĉiujn utilajn kunvenojn kaj diskonigos ĉiujn utilajn dokumentojn ;
- la GRUPO kunvenigos ĝeneralan konstituan asembleon, kiu decidos pri sia nomo, siaj statutoj, sia agprogramo. Nuntempe, ĝi prezentiĝas kiel libera asocio, kies A.P.J.R. (Asocio por protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj, 80, rue des Noyers, Crisenoy, F77390 VERNEUIL L'ETANG) plenumas la sekretariecon ;

- la NACIAJ SEKCIOJ de la GRUPO povos kunvenigi ĝeneralajn konstituajn asembleojn por konstitui asociojn liberajn aŭ deklaritajn laŭ la leĝoj de siaj landoj ;
- la GRUPO celas nur tion, kio estas ĉi-supre indikita. Post la adopto de siaj statutoj, ĝi havos plu nur statutajn celojn.

Alvoko diskonigita en la 80.12.18

Ĝisdatigo n^o 7 : 84.02.01

La.....

Subskribo de la sendinto :

Eventuala indiko de ties adreso :

FUNDAMENTA TEKSTO

rilate

- * la Universalan Kodon de Scienca Ekologio,
- * la Supernaciajn Servojn pri Sciencaj Rekomendoj kaj Decidoj, kaj la Universalan Kortumon de Justico.

Tiun tekston preparis parto de la personoj kaj asocioj, anoj de la Universala Grupiĝo tiucele konsistigita. Tiu ĉi estas projekto, ne definitiva teksto. Do, ni bonvole submetas ĝin al vi. Viaj eventualaj rimarkoj povos esti ĝeneralaj aŭ/kaj propraj al iu frazo. Ni numeris ĉiun alineon de nia teksto por faciligi la redaktadon de viaj propraj rimarkoj kaj la studadon, kiun ni faros pri tiuj. Ni prezentos al la membroj de nia redakta komitato ĉiujn ricevitajn rimarkojn; ĉi tiuj tiam redaktos plibonigitan tekston, kiun ili sendos al ĉiuj korespondantoj kaj anoj de nia Universala Grupiĝo.

I. DIFINOJ

- 1 Scienco estas tuto de konoj kaj eksperimentoj rilataj al iuj korpoj, elementoj, faktoj kaj fenomenoj de la mondo minerala, vegetala, animala (i.a. homo) kaj de ties ĉirkaŭo planeda kaj eksterplaneda, interligitaj per objektivaj, komunaj propraĵoj.
- 2 Sciencist(in)o estas persono diplomita aŭ ne, kiu zorgas pri scienco, daŭre aŭ okaze.
- 3 La scienca deontologio estas la tuto de moralaj reguloj, kiujn la sciencistoj sin devigas respekti en sia laboro, aŭ kies respekton oni trudas al ili.
- 4 La kodo de scienca deontologio fiksas leĝe la regulojn de tiu deontologio, la eblojn respekti ĝin kaj la aplikeblajn sankciojn kontraŭ la sciencistoj, kiuj ĝin malobeas. Tiu kodo estas universala pro tio, ke la sciencoj estas universalaj en siaj esploradoj, elpensoj, aplikoj, utiloj, riskoj, malutiloj. Inverse, aktivado ne povas pretendi sin scienca, aŭ oni ne povas al ĝi riproĉi esti scienca, se ĝi ne respondas al tiu karaktero de universaleco. La reguloj de tiu kodo estas modifeblaj.

II. RAPORTO PRI MOTIVOJ

- 5 Multe da sciencistoj priarogas la senkulpon de la "Scienco" kaj la nekontraŭstareblan antaŭeniradon de la "Progreso" ("Progreso estas nehaltigebla") por malpermesi al si demandi, ĉu iliaj laboroj, esploradoj aŭ elpensoj prezentas aŭ prezentos malutilon kaj/aŭ danĝeron por la naturo kaj por la vivuloj, interalie por la homoj kaj ilia posteularo.
- 6 Sciencist(in)o povas ne kompreni la gravecon de siaj esploradoj, eltrovo aŭ elpenso, kies apliko fare de li (aŭ ŝi) aŭ de aliaj, povos, senprokraste aŭ prokraste, sin montri malutila aŭ/kaj danĝera.
- 7 Historio atestas sekretan konsenton pli kaj pli gravan kaj reciprokan inter sciencistoj kaj gvidantoj, decidantoj de povoj politikaj, ekonomiaj, industriaj, militistaj, ktp. Unuflanke, iuj sciencistoj mem proponas al iuj gvidantoj siajn esplorojn, eltrovojn aŭ elpensojn, eĉ se ili estas aŭ povas fariĝi malutilaj aŭ/kaj danĝeraj; aliflanke, iuj el tiuj gvidantoj petas aŭ postulas de sciencistoj, ke ili plenumu iujn laborojn, esplorojn, eĉ se la rezultoj de tiuj laboroj aŭ esploroj estas dezirataj malutilaj aŭ/kaj danĝeraj, aŭ povas montriĝi tiaj.
- 8 Ĉar la kresko de sciencaj konoj en iuj regnoj, ilia komplekseco neprigas septadon de multaj sciencaj kampoj, la ĉiuspecaj sekretoj, kiuj ilin ĉirkaŭas, faras, ke la sciencistoj perdas la mastrecon super sia scienco kaj, ke la gvidantoj de tiuj regnoj disponas superregadon kaj malutilas aŭ povas malutili grave al propraj kaj alilandaj popoloj.
- 9 La apliko al militista kampo de iuj elpensoj aŭ eltrovoj konsistigas prioritaton aŭ eĉ ekskluzivecon por la gvidantoj de nacioj evoluantaj kaj/aŭ riĉaj. Ili tiel disponas povon pri ĉantaĝo, kies plenumo povas signifi la morton kaj la dekadencan fizikan kaj fiziologian de miliono; da individuoj kaj nerebonigeblan socian malorganizadon.
- 10 La imperiismo de la gvidantoj de tiuj nacioj - kia ajn estu ilia politika reĝimo - instigas tiujn gvidantojn korligi al si la klientaron de satelitaj nacioj, vasalaj ekonomiaj, industriaj grupoj, kies responduloj, kvankam malpli potencaj, povas iniciati procezojn de malstabiligo, lokajn militojn, kies pligraviĝo riskos eskapi al ĉiu kontrolo, kiam tiuj procezoj ne estas truditaj de la gvidantoj aŭ/kaj de la

feŭdestraj ekonomiaj grupoj.

- 11 Federacio de nacioj akceptantaj supernaciajn, politikajn regulojn, fondita por preventi la eksplodon de amasdetrua milito, permesus bridi tiujn danĝerojn, malpliigi ties gravon, transformi armelspezojn en pacelspezojn. Supernaciaj organizadoj de civitanoj kontribuus al tiu ŝanĝiĝo.
- 12 Por doni universalan pravigon al la protekto kontraŭ la malutilaj aŭ/kaj danĝeraj aplikoj de iuj sciencoj, konvenas redakti kaj adoptigi **UNIVERSALAN KODON DE SCIENCA DEONTOLOGIO**, kiun respektu la sciencistoj kaj la diversaj povoj, kiuj evoluigas la sciencajn esploradojn kaj/aŭ utiligas la aplikojn de tiuj sciencoj. Por diskonigi tiun projekto pri KODO, la **SUPERNACIAJN SERVOJN PRI SCIENCAJ REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ**, kaj la **UNIVERSALAN KORTUMON DE JUSTICO**, kiuj estas ĝiaj fundamentaj aplikrimedoj, la sciencistoj kaj la ne-sciencistoj estas invititaj partopreni en la **GRUPIĜO-KODO : UNIVERSALA GRUPIĜO DE LA PERSONOJ KAJ DE LA ASOCIOJ AKTIVANTAJ POR STARIGI UNIVERSALAN KODON DE SCIENCA DEONTOLOGIO, SUPERNACIAJN SERVOJN PRI SCIENCAJ REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ, KAJ UNIVERSALAN KORTUMON DE JUSTICO**. Kiam tiu **KODO** havos leĝforton en unu regno, la anoj de la Grupiĝo KODO kontrolos ĝian plenumadon kaj proponos ĉiujn plibonigojn pri ĝia redakto.

III. MORALAJ RAJTOJ KAJ DEVOJ DE LA SCIENCISTOJ

- 13 **Artikolo 1a.** La praktiko de la scienca esplorado, en ĉiuj siaj niveloj de ellaborado, postulas de kiu sin dediĉas al ĝi, la publikan agnoskon de la leĝoj pri la honesteco kaj la obeon al tiuj leĝoj pri kiu la esploristo sin ŝuldas.
- 14 **Art. 2a.** La scienca esplorado celas la kreskadon de la homa scipovo kaj la plibonigon de la sorto de ĉiuj homoj.
- 15 **Art. 3a.** La scienca esplorado povas, neniel, celi, falsi, kaŝi aŭ maski la eksperimentojn, kiuj informas la homojn pri la naturo de la aĵoj, pri la medio en kiu ili vivas kaj pri la modifoj naturaj aŭ artefaritaj de tiu medio.
- 16 La scienca esplorado nepre informu la homojn, en ilia tuto, pri tiuj realaĵoj.

17 **Art. 4a.** La scienca esplorado povas, neniel, konsideri, rigardi homajn estulojn aŭ homajn grupojn kiel eksperimentan materialon kaj submeti ilin al vivkondiĉoj artefarite fiksitaj esplorcele.

18 Tial, estas ekskluzivitaj de la scienca esplorado ĉiuj ĥirurgiaj operacioj kaj ĉiuj genetikaj manipuladoj uzantaj la metodon pri diferencoj, kiu determinas la pozitivajn kvalitojn de homaj estuloj, metante ilin en kondiĉojn, kiuj malpermesas tiujn kvalitojn kreski.

19 **Art. 5a.** Nenia scienca esplorado povas celi la realigon de teknikaj operacioj, kiuj modifas la biologian homan medion, difektante la medion kaj igante ĝin netaŭga por la homa vivo, tia kia plenumata per la tuta ekzercado de la taŭgoj kaj kapabloj de ĉiu.

20 **Art. 6a.** La scienca esplorado ne estas profesio : estas digno. Ĝia celo ne estas la materia riĉiĝo de kiu sin dediĉas al ĝi. Tial la salajro de la esploristo estas fiksitaj tiel, ke li havu decan vivon kaj povu praktiki la esploron pleje laŭ siaj intelektaj kapabloj. Tiu salajro kreskas nur laŭ la ordinaraj reguloj de la aĝo kaj de la familia situacio. Nenia kreskigo de la salajro, nenia financa avantaĝo ligiĝas al la pozitivaj aŭ negativaj ŝancoj de la esplorado. Nenia partopreno al profitoj de la komerca ekspluatado de elpensoj estas permesita.

21 **Art. 7a.** Ĉiu esploristo devas agnoski, ke la homa persono estas libera, plene disponas sian penson, tiamaniere, ke ia ajn ago, celanta senigi homon je sendependo de lia prijuĝo, - aŭ per psikologiaj ebloj de premdevigo, aŭ per materiaj, sekretaj kaj ellaboritaj teknikoj -, estas ago kontraŭa al la scienca honesteco kaj sekvigas la eksigon el la scienca komunumo de ĉiu esploristo, kiu malobeas tiun artikolon.

22 **Art. 8a.** La scienca esplorado konsistigas novan socian funkcion, kies statuto ne estas difinita. La morala respondeco, kiu trudiĝas al la esploristo pro la efiko kaj la komplekseco de la modernaj sistemoj de eksperimentado, ne permesas al la esploristo esti submetita al la ŝtatsaĝo. Ĝi ankaŭ ne permesas esti submetita al la ordonoj de privata entrepreno.

23 Do konvenas difini, nune, la signifon kaj la naturon de nova publika "planeda" ofico, kies buĝeto, organizado kaj strukturoj estos precizigitaj konforme al la antaŭaj reguloj post popola konsulto.

24 **Art. 9a.** Ĉiu viro aŭ virino, kiu sin devontigas en la scienca esplorado, sub la titolo de studento aŭ de instruisto, devas publike deklari, per sia honoro, kaj subskribi la promeson respekti la regulojn de la kodo pri scienca deontologio.

25 **Art. 10a.** Ĉiu profesoro en scienca disciplino nepre klarigu tiun kodon kaj montru ĝian pravecon al ĉiuj siaj studentoj.

IV. LA KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO

26 **Art. 11a.** Laŭ la artikoloj 1a ĝis 10a ĉi-supre, estas fondita, en la dato de **UNIVERSALA KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO**, kiu fiksas la regulojn, kiujn respektu la sciencistoj en ĉiuj regnoj dum sia laboro.

27 **Art. 12a.** Tiu KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO havas universalan rolon, ĉar ĉiuj sciencoj estas universallaj. La sciencistoj povas priarogi la disponojn de tiu KODO, se ĝi ankoraŭ ne estas leĝe adoptita en ilia regno.

28 **Art. 13a.** La esenca celo de la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO estas :

29 a) rekomendi al la sciencistoj ĉiujn klopodojn efektivigendajn en siaj esploroj, senprokraste aŭ prokraste, por ke tiuj esploroj ne difektu aŭ ne risku difekti la naturon : biosferon kaj vivantajn estulojn ;

30 b) malpermesi tiujn esplorojn, senprokraste aŭ prokraste, provizore aŭ porĉiame, se ili trafas aŭ trafos la naturon : biosferon kaj vivantajn estulojn.

31 **Art. 14a.** En la praktiko de siaj laboroj, ĉiu sciencisto, por kontroli ĉu ili estas aŭ restas konformaj al la preskriboj de la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO devas sin turni al unu el la **SUPERNACIAJ SERVOJ PRI SCIENCAJ REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ** (vidi ĉi-poste) fondita en lia aŭ alia regno. Tiu devo estas persona kaj nekontestebla.

V. SUPERNACIAJ SERVOJ PRI SCIENCAJ REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ

32 **Art. 15a.** Ĉiu sciencisto devas akcepti la ekziston kaj subteni la agadon de tiuj SERVOJ, eĉ se ili ne posedas delegacion en lia regno. Tiuj SERVOJ estas komisiitaj:

- 33 15a.1e) apliki nur kaj strikte la preskribojn de la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO;
- 34 15a.2e) studi la novajn eltrovojn kaj elpensojn por kontroli ties nuran konformecon al la preskriboj pri la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO: ili deduktas de tio, aŭ REKOMENDOJN, kiuj rolas nur averte, aŭ DECIDOJN, kiuj kunportas moralan devon aplikeblan senprokraste aŭ prokraste;
- 35 15a.3e) en ĉiu regno, kie ĝi estas agnoskita, ĉiu SERVO uzas la nacia(j)n lingvo(j)n en siaj rilatoj kun la sciencistoj de tiu regno aŭ de aliaj regnoj parolantaj tiun lingvon (aŭ unu el tiuj lingvoj). Por la aliaj interlingvaj rilatoj, Esperanto estas rekomendita;
- 36 15a.4e) respondi al la nuraj demandoj pri scienca deontologio, kiujn direktas al li iu ajn persono (sciencist(in)o diplomita aŭ ne, ne-sciencist(in)o aŭ asocio) kaj alporti daŭre al ĉiuj sciencistoj ĉiujn informojn, kiuj permesas al ili ligi la deontologiajn devojn pri sia fako kun tiuj pri sciencoj sia kaj proksimaj;
- 37 15a.5e) informi daŭre la publikan opinion kaj la gvidantojn de la povoj politikaj, ekonomiaj, industriaj, ktp, pri la REKOMENDOJ kaj DECIDOJ, kiujn ili prenas, por ke tiuj gvidantoj apliku ilin en la ekzerco de siaj povoj kaj, ke la publika opinio sciu, ke la gvidantoj estis informitaj pri tiuj ĉi;
- 38 15a.6e) publikigi la alprenitajn decidojn de tiuj povoj sekve de la komuniko pri iliaj propraj REKOMENDOJ kaj DECIDOJ, aŭ la foreston de la decidoj, kiuj estis esperitaj de tiuj povoj;
- 39 15a.7e) permesi ĉiumomente la transformon de eltrovoj aŭ elpensoj, novaj aŭ malnovaj, en difinitajn, praktikajn aplikojn, i.a. industriajn, se tiuj aplikoj estas konformaj al la preskriboj de la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO;
- 40 15a.8e) limigi aŭ malpermesi, provizore aŭ definitive, tian aŭ tian aplikon de scienco, ĉar ĝi montriĝas malutila aŭ danĝera;
- 41 15a.9e) plejeble vaste konigi siajn REKOMENDOJN koncerne la "mildajn teknikojn", kiam ĉi tiuj

- povas esti uzataj prefere ol la "malmildaj teknikoj", sur ĉiuj kampoj: energio, industrioj, agrikulturo, medicino kaj kirurgio, ktp;
- 42 15a.10e) krei informservojn profite al la laika publiko. Tiuj servoj celos klarigi, laŭ simpla maniero, la certajn avantaĝojn, la eblajn riskojn, la malutilon, la realajn danĝerojn de la elpensoj, eltrovoj, de ties apliko, kaj la apelaciojn, kiujn la publiko povas pretendi;
- 43 15a.11e) proponi interparoladojn al la sciencistoj por helpi ilin valorigi sian respekton pri la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO, se ili ne scias aŭ ignoras ĝiajn preskribojn;
- 44 15a.12e) submeti al la UNIVERSALA KORTUMO DE JUSTICO la dosierojn pri la sciencistoj ĝenataj pro sia respekto al la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO, por ke la KORTUMO povu defendi ilin, aŭ la dosierojn pri la damaĝoj kaŭzita de sciencistoj al la preskriboj de la KODO, malgraŭ la REKOMENDOJ aŭ la DECIDOJ komunikitaj al tiuj sciencistoj;
- 45 **Art. 16a.** Koncerne la esplorojn, kiuj antaŭas eventualan eltrovon, ĉiu sciencisto sin devontigas informi unu el la SERVOJ pri ĉiuj konsekvencoj favoraj aŭ/kaj malfavoraj, kiujn li konstatas aŭ konjektas pri siaj aŭ aliaj esploroj, kiujn li povas koni.

VI. LA UNIVERSALA KORTUMO DE JUSTICO

- 46 **Art. 17a.** Estas fondita, en la dato de UNIVERSALA KORTUMO DE JUSTICO, ĉi-poste nomita KORTUMO.
- 47 **Art. 18a.** La KORTUMO estas UNIVERSALA pro tio, ke ĝi povas juĝi ĉiujn malobeojn al la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO, kie ajn konstatitajn.
- 48 **Art. 19a.** La KORTUMO konsistas el unu plena ĉambro kaj sekciaj ĉambroj koncerne la sciencojn, la industriojn, la individuajn liberecojn, la vivmedion, ktp.
- 49 **Art. 20a.** La KORTUMO konsistas el konsilantaj nomitaj de la sciencistoj en ĉiu regno, po unu aŭ x konsilanto(j) en en ĉiu sekcio dum jaroj. La konsilantoj elektas la prezidanton de la KORTUMO kaj la prezidantojn de la sekcioj, kiuj estas samtempe vicprezidantoj de la KORTUMO.
- 50 **Art. 21a.** La KORTUMO ricevas ĉiujn honordevoligojn

skribitajn de la sciencistoj en ĉiuj regnoj (vidi ĉi-supre, art. 9a)

51 **Art. 22a.** La KORTUMO publike juĝas la postulojn, kiujn ĝi devas enketi kaj juĝi en limtempo kiel eble plej mallonga, suba al unu jaro. Povas deponi postulon la SUPERNACIAJ SERVOJ PRI REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ, aŭ personoj, aŭ asocioj, aŭ registaroj.

52 **Art. 23a.** Advokato aŭ iu libere elektita persono povas asisti la postulantojn, kiuj restas la mastroj pri sia defendo kaj povas nuligi tiun helpon ĉiumomente.

53 **Art. 24a.** La lingvo praktikata en la KORTUMO estas Esperanto. Traduko esperanta akompanu nacilingvajn postulojn.

54 **Art. 25a.** La KORTUMO publikigas ĉiujn siajn juĝojn.

55 **Art. 26a.** La KORTUMO ne formulas punajn sankciojn, ĉar ĝia kompetento estas morala.

56 **Art. 27a.** La monrimedoj de la KORTUMO estas : kotizoj pagitaj de la sciencistoj kaj asocioj, kontribuajfoj de registaroj kaj internaciaj instancoj, donacoj kaj enspezoj (vendo de la oficiala ĵurnalo de la KORTUMO, de dokumentoj, bienoj transporteblaj aŭ ne, ktp).

57 **Art. 28a.** La KORTUMO transpagas kvoton el siaj enspezoj al la SUPERNACIAJ SERVOJ PRI SCIENCAJ REKOMENDOJ KAJ DECIDOJ.

58 **Art. 29a.** La celo de la KORTUMO, se ĝi estis starigita sekve de adopto de la KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO, povas etendiĝi al enketo kaj juĝo pri faktoj sen rilatoj kun la scienca deontologio. Tiukaze, ĝiaj konsilantoj decidis, ĉu ili akceptos tiun vastigon de siaj funkcioj, kiu ne malutilu al ilia fundamenta celo. Tiam, ili fiksis la kondiĉojn de tiu vastigo kaj submetos ĝin al la anaro de la tutmonda scienca komunumo, kiu decidis pri tio.

Alvoko diskonigita en la 80.12.18

Ĝisdatigo n^o 7 : 84.02.01

Sendinto : koordinatoj
de la PERSONO,
aŭ stampo de la ASOCIO

ALVOKO AL HOMOJ

por protekto de la homoj

minacitaj per morto

aŭ malsanoj imputeblaj

al nuklea milito

aŭ civila nuklea katastrofo⁽¹⁾

Al anoj de la medicinaj kaj kuracaj profesioj,

Al estontaj eblaj viktimoj de nuklea milito

aŭ de civila nuklea katastrofo,

Al ĉiuj landasocioj, inkluzive tiujn de anoj

de la medicinaj kaj kuracaj profesioj

La multiĝo de la nukleaj armiloj pliigas riskon de nuklea milito, kiu neniigos grandan parton de la homaro, meze de suferoj kaj de kanceraj trafoj, kiuj tiam rememorigos al la kompatindaj viktimoj la teruron de Hiroŝimo kaj Nagasako⁽²⁾

La multiĝo de la nukleaj instalaĵoj kreas arte faritan radioaktivecon vere gravan, kiu neprigas, en laŭdire paca tempo, kreskantan radioaktivan nocivon kaj la riskon de civilaj katastrofoj laŭ la tipo de "Three Mile Island".

La nocivo kaj la riskoj imputeblaj al la nuklea industrio estas nedisigeblaj de la nocivo kaj riskoj imputeblaj al genocidoj de Hiroŝimo kaj Nagasako, al provoj de nukleaj bomboj kaj de riskoj de nuklea milito.

Urĝas, ke ĉiuj personoj, ĉar ili suferas la nocivon kaŭzatan de la nuklea industrio normale kaj nenormale funkcianta, kaj ĉar ili estas minacataj per nuklea genocido aŭ per civila nuklea katastrofo, agu persone aŭ kolektive ĉe ĉiuj asocioj, internaciaj kaj naciaj organizoj de kuracistoj kaj anoj de kuracaj profesioj, ĉe ĉiuj, kiuj havas povon en la socio : regantoj, ekonomiaj, religiaj, sindikataj gvidantoj, ktp, kaj ĉe ĉiuj, kiuj povas esti iliaj parolkomisiitoj : amaskomunikiloj, elektitoj, pensuloj, aktivuloj, artistoj, ktp, por ke ĉiuj ekkonu kaj komprenu la gravecon de tiu nocivo kaj de tiuj danĝeroj.

Kuracistoj kaj anoj de kuracaj profesioj, kaj de viaj asocioj, petu al via ministro pri sano vian asignon okaze de nuklea milito aŭ de civila nuklea katastrofo, kaj demandu kiamaniere vi povos precize plenumi la mision, truditan al vi, tamen ĉu vi estas aŭ ne estos al ĝi preparitaj.

Estantaj eblaj viktimoj kaj viaj asocioj, petu la anojn de la medicinaj kaj kuracaj profesioj najbarajn de vi kaj de ties asocioj, precizigi al vi kion ili precize faros por vi, se nuklea milito eksplodos en via lando, aŭ se civila nuklea katastrofo surprizos vian regionon.

NI AGU ANTAŬ OL ESTOS TRO MALFRUE.

(1) La legintoj de tiu alvoko povas peti de A.P.J.R. (80 rue des Noyers, Crisenoy, F 77390 VERNEUIL L'ÉTANG) la franclingvan presitan broŝuron: "Immonde Pluton, ceux qui vont mourir te saluent" (Naŭza Plutono, kiuj tuj mortos, tiuj cin salutas), kie kelkaj esencaj argumentoj estas mallonge prezentitaj. Tiu broŝuro, finpresita en la 1a trimestro de '83, kunportas formulon de aprobo.

(2) La Monda Organizaĵo de Sano publikigis en '84: "Efikoj de la nuklea milito pri la sano kaj la sanservoj".

Alvoko diskonigita en la 82.09.30
Ĝisdatigo n° 3 : 83.05.12

La.....
Subskribo de la sendinto :

Nia debato :

(La unua parto aperis en **Laŭte** 55)

B★E

BAZA ESPERANTO

Jen estas nova invento !

Ĉu nova ?

Al mi ŝajnas, ke B.E. jam ekzistas kiel fortika okdekjarulo sub la nomo : Fundamento de Esperanto. Per la malmultaj radikoj de ties Universala Vortaro, uzante la latentajn eblojn de la esperanta vortfarado, oni povas multon esprimi: tion la Majstro majstre pruvis en siaj verkoj, kaj estas tre dezirinde, ke ni laŭeble lin imitu. Sed li ne timis doni ekzemplon pri pliriĉigo al sia UV, mem enkondukante multajn neologismojn. Ĉu ni estu pli rojalistaj ol la reĝo, pli fundamentistaj ol la aŭtoro de la Fundamento ? Zamenhof montris al ni, kiel riĉa trezoro kuŝas pli-malpli kaŝite en la Fundamento, sed kiam li bezonis novan vorton, li ne hezitis krei ĝin. Do ni strebu ekspluatadi ĉiujn riĉaĵojn, kiujn liveras al ni la Fundamento, la vera Baza Esperanto, sed ni ne perforte limigu, eĉ por la bezonoj de komencantoj, la pliriĉigan evoluadon de nia vivanta lingvo.

En la eta klubo de mia urbo Nimo mi konstatas, ke kelkaj komencantoj, dezirantaj ne resti balbutantoj kaj nur turismaj praktikantoj, sed penante fariĝi progresantoj, daŭre pliriĉigas sian personan vorttrezoron per legado de libroj eĉ malfacilaj, laŭbezone kontrolante siajn akirojn per vortaroj, kaj tiel rapide atingas pli altan nivelon. Jen estas la bona metodo.

Konklude : nia lingvo estas sufiĉe simpla, ke ni ne bezonu plisimpligu ĝin; ĝi estas tro bela, ke ni stumpigu kaj kripligu ĝin per amputoj.

Valo

Baza Esperanto estas eble misnomita, ĉar tiu nomo estigas konfuzon : ne temas pri aparta lingvo, pri qwyx-a reformo aŭ tia afero.

Iu aludis eĉ pri "1984", la libro de Orwell, en kiu la popoloj devis paroli lingvon simpligitan, kiu ne posedis vortojn kiel "libereco".

Per tiu rimedo, malortodoksaj ideoj ne povis esti esprim-

PRINCIPOJ DE BAZA ESPERANTO ①



DIALOGO INTER
KOMENCANTOJ


SEN
KUN **B★E**

②



DIALOGO INTER SPERTULO
KAT KOMENCANTO

SEN
KUN **B★E**



ataj.

Baza Esperanto, laŭ mi, devas esti io alia : Temas interalie pri aro da vortoj, kiujn la komencantoj devas lerni unue kaj per kiuj la spertaj esperantistoj devas esti kapablaj sin esprimi sen uzi la aliajn. Ili, kompreneble, uzu la plenan lingvon kun aliaj spertuloj.

Tial, mi anstataŭigus "Baza Esperanto" per "Baza, Parolata kaj Skribata Esperanto". La unua nomo estas nur mallongigo de la dua.

Ĵansebo

Kelke da respondoj pri B*E, far' de "GIZ"

"Kial strikte difini Bazan Esperanton?" demandas Nicole : "devege ekzistas pluraj niveloj en ĉiuj lingvoj..."

Tio ne estas vera; la "piĝino-lingvoj" havas nur unu nivelon, la plej malaltan. Se ni tro emfazas la **simplecon** kaj facilecon de Esperanto, la kleruloj malŝatas ĝin kiel piĝino-lingvon - kaj se ili ne diras malkaŝe, ke ili neniam interesiĝos pri Esperanto ĉar ĝi estas "lingvo por mens-malfortuloj", ili tion ne diras nur por eviti ofendon al naivaj idealistoj kiel ni (= kiaj ni estas... laŭ ili).

En Italio, "esperanto" fariĝis komuna nomo de ĉiu simpligita lingvaĵo. Se oni provas klarigi al kulturita ne-Esperantisto ke oni povas uzi E-on ankaŭ por traduki famajn ĉefverkojn, kiel ekzemple la Dante-an "Dian Komedion", plejofte ĝili respondas "Ĉu vere? Interesa afero!" sed en si mem daŭre opinius, ke esperantigante "Dian Komedion" oni ricevus..."Fian Komedion", simplaĉan atencon kontraŭ la Literaturo kaj la Belaj Artoj. La reago de Jakelino kontraŭ B*E estas ĝuste la sama, kiun havas tre multaj kleruloj kontraŭ Esperanto mem. Tio estas **fakto**. Jen kial oni devus **propagandcele** klare distingi inter B*E (parto de la tuto) kaj Plena esperanto (la tuto mem)!

Ĉar, se ni propagandas **Bazan** Esperanton, eble fariĝos evidente ankaŭ al plej misinformita ne-Esperantisto, ke la nuntempa lingvo universala jam evoluis kaj riĉiĝis : nun ĝi ne nur havas "**bazon**", sed ankaŭ "**altecon**" kaj "**dikecon**" : ĝi kreskis ! ĝi ankoraŭ nun kreskadas !

La "Unua Libro" de D-ro Zamenhof enhavis 947 vortradikojn kaj "plenan gramatikon" el 16 reguloj. Bonvolu la Esperantistoj kompari kun, ekzemple, la Plena Ilustrita Vortaro kaj la Plena Analiza Gramatiko de la nuntempa Esperanto. Sed, ĉu ni povus **montri** ilin al ĉiu ne-Esperantisto ?

"Kial B*E, nova baptonomo, anstataŭ "facila Esperanto" uzata de **Kontakto** ?" Ankoraŭ pro "flugfolia propagandarto", ĉar se B*E estas "facila Esperanto" oni povas kompreni, ke Plena Esperanto estas... malfacila!! Krome, la vorto "baza" ne havas la subkonscian subsencon "taŭga nur por stultuloj", kiun bedaŭrinde havas la vorto "facila" por multaj personoj; ĝia subsenco estas, ke "bazo" estas bazo de io supera, ĉu ne?

Laŭ mi oni devas propagandi la facilecon de **Baza** Esperanto kaj samtempe la plenan taŭgecon de Plena Esperanto por sia rolo de lingvo internacia.

Mi opinias, ke la lerniloj de Baza Esperanto devus esti kiel eble plej simplaj, se nur eble amuzaj, montrantaj en la teksto mem (ne per predikoj tedaj) la belecon de la idealo de Esperanto. Mi legis kun interesiĝo pri la baldaŭa naskiĝo de nova revuo "**OVO**". La reklamo asertas : "internacia revuo por distro kaj amuzo, taŭga precipe por komencantoj". Tiu revueto estos ido de la "Zagreb-metodaj" lernolibroj - kiuj ja uzas limigitan vortotrezoron, t.e. la ĉiutagan, familian lingvaĵon.

Ĉu iu Laŭtulo jam spertis tiun metodon kaj povas informi, ĉu la uzata vortaro estas sufiĉe ampleksa, kaj ĝenerale pri la efiko de tiu metodo ?

Eble estus grava psikologia eraro tro simplige prezenti la gramatikon de Esperanto al la homoj, kiuj ŝatas nek la simplecon, nek la facilecon. Ili ankoraŭ lernu (Plenan) Esperanton per tradiciaj metodoj, se ili volas, kaj ĝuu la eblecon krei elstarajn stil-efektojn : "pri gustoj ne disputendas", admonas la popola saĝo.

Sed kial malpermesi al tiuj, kiuj preferas la simplan ĉarmon de Baza Esperanto, ĝui en la nuntempo la saman plezuron, kiun spertis la unuaj Esperantistoj ? La ĉarma elvokado de novaj vortoj el simplaj radikoj povas esti ankaŭ ludo : "flugmaŝino", "malŝlosilo" (por ŝtelistoj), "elektrofluo"... Tio stimulas la fantazion kaj la individuan kreivon - sed oni povus ankaŭ krei "vortaron de la kunmetaĵoj de B*E" kun klarigo en B*E kaj, parenteze, la nebaza termino.

Ekzemple : ELEKTROFLUO - fluo de elektro pasanta tra kondukilo; (**kurento**).

Tia vortaro estus laŭ mi tre utila por faciligi la vojon al Baz-Esperantisto, kiu, jam bone posedanta kaj svinge parolanta B*E, sentas altiron al la Plena formo de nia bela lingvo. Sed, se al ĝili sufiĉas B*E, aŭ se li ne havas tempon por pliprofundigi sian lernadon, oni devas respekti lian rajton. Ĉar, se la unuaj Esperantistoj povis "movadumi" per 947 radikoj, kial, diable!, Baz-Esperantisto ne povus movadumi per

1000 aŭ 1500 ? Ne ĉiam necesas la "precizaj vortoj", kiam oni konas la eblecojn de l' kunmetado kaj kiam la "limigita vortotrezoro" entenas kompletan liston de **ĝeneralaj vortoj**. Laŭ vi, kio povas esti "grandega mar-mamulo" ? kaj "maldikiga longa glavo" ? La baleno povus esti nomata ankaŭ "mar-grandegulo" kaj la rapiro "fadenglavo". Baza Esperanto estas ne "Muza", sed almenaŭ "amuza".

Mi iam legis artikolon de anglalingvano defendanta Basic English kontraŭ la oponentoj. **Neniel** li asertis, ke Basic English estas amuza ! Eĉ, male, li parolis pri "perdo de magieco neevitebla", kaj el la restanta "defendado" ŝajnis al mi, ke la gramatiko de B. English aŭ estas tute malkohera kun la "normala" angla aŭ devas fariĝi tiel tempoperde evitema kontraŭ la "normalaj" malregulaĵoj de la angla, ke mi tute ne miras pri la reago de ĉiuj anglalingvanoj amantaj sian lingvon - kiu havas propran "spiriton" sed tute diferencan de Basic English.

Male, Baza Esperanto estas tute kohera parto de Esperanto, kaj ne povas fariĝi "diferenca lingvo", ĉar ĝi ne povas krei neologismojn, sed nur kunmeti la ekzistantajn radikojn. Povos ja okazi, ke por la sama koncepto ekzistas Baz-Esperanta kunmetaĵo kaj Plen-Esperanta termino : "elektrofluo" kaj "kurento". Tio ŝajnas al mi bona afero, ĉar oni povos uzi la unuan aŭ la duan laŭ la neceso, la persona gusto, la stilo (familia, teknika, poetika...).

Mi legis en "El Popola Ĉinio" artikolon de Ĝu Ŝjueli pri tiu terno. La han-a lingvo kiel eble plej ofte uzas kunmetaĵojn anstataŭ neologismojn, ekzemple "elektrovojo" anstataŭ "cirkvito", kaj havas vortaron, kie estas klarigita la signifo de tiuj kunmetaĵoj. Ĉar Esperanto ne konsistas nur el unusilabaj vortoj kiel la han-a lingvo, ja kelkaj kunmetaĵoj fariĝos iom pezaj - kvankam certe pli "magiecaj" ol la teknikaj vortoj !

Sed, ekzemple, teknika revuo pri abelkulturo povus uzi B*E kaj krome "fakvortaron" pri abelkulturo, kaj same pri fakrevuoj alitipaj celantaj pli vastan legantaron. Neniu havas problemon por lerni bone elektitajn terminojn de fako, kiu interesas al ĝili. Laŭ mi, estus tre bone, se tiuj revuoj, uzante la unuan fojon terminon en artikolo, klarigus ankaŭ la signifon, aŭ aldonus la B*E-ekvivalenton. Jam la unua "ŝtupo" de Meza Esperanto havus praktikan utilecon - ne nur "ni idealistoj" ekzistas en la mondo! - por internacia interŝanĝo de fakaj spertoj.

Cetere, Lilia, estus tre malfacile por Esperanto plenflori

sen antaŭe "duonflori"! Gravus, ke ankaŭ la "duonfloroj" estu fekundigitaj kaj donu bonan frukton - kaj semojn por la estontaj "plenfloroj".

Kvankam temas pri koincido, vi ja pravas, 1984 estas tre taŭga jaro por "lanĉi" B*E. (Mi bedaŭras, ke mi povas "lanĉi" nur la ideon, ĉar kompreneble B*E mem povas konkretiĝi nur en la sino de l' Esperantistaro). En la romano (mal-utopia) de G. Orwell, titolita "1984", kruela kaj tre inkviziciema totalisma ŝtato planas malpermesi al la preskaŭ-brutigita hom-amaso eĉ naskigon de penso kontraŭ la Granda Frato (t.e. la mitigita Gvidanto de la ŝtato), aŭ kontraŭ la ĉiam daŭra, senrezulta, mizeriga militado, aŭ kontraŭ la (relativaj) privilegioj de la reganta "klaso".

Ĉar la inkviziciistoj bone scias, ke la lingvo lernita de l' infaneco influas kaj eĉ kondiĉas la pensadon, ili tre zorgeme "ĉizas" el la angla lingvo la tre raciigitan "Neolingvon". Raciigita ĝi estis, sed por malpermesi la autonoman pensadon. Simpla ĝi estis, kaj en la intenco de la kreintoj ĝi en la estonteco devus fariĝi pli kaj pli simpla - certe, necesas iom da tempo por instrui al homaj estaĵoj, ke ili devus pensi kaj "paroli" kiel hundoj ! Jen la minimuma lingvaĵo : boj! boj! grr... (kiam la mastro volas, ke la hundo ataku). En "1984" oni ne parolas pri hunda lingvo, sed ĝi estas la sekvanta etapo direkt' al la senkonsciigo de la homo.

Ŝajnas al mi, ke B*E (kiu estas nur parto de Esperanto) iras en tute kontraŭa direkto. Se ĝi vere konkretiĝos, ĝi estos "Jes" lingvo, ĉar ĝia celo kaj idealo estas **pozitive** influu la homan menson, se eble liberigante ĝin el la negativaj influoj. Laŭ mi, tio estas la plej grava celo de Esperanto : ĉar se ĝi fariĝos lingvo "internacia, kultura kaj scienca", sed perdos sian animon, kaj estos uzata por disvastigi antaŭjuĝojn kaj senkaŭzan malamon inter homgrupoj, ĝi ne plu meritos sian nomon, sed ĝi devos esti baptita "Fiperanto" kaj ĝianefikecon kiel interlingvo oni povos bone taksi, kiam la povra Teluro, nia planedo-patrino, eksplodos sub niaj piedoj. Hura! Finfine la paco !

Nu, ankaŭ **pozitive-influa** interlingvo ne povas fari miraklojn ; sed se ĝi almenaŭ kutimigas la homon vidi alian homon kiel kunfraton, ne kiel "iremdulon" (tre eble danĝeran, kaj ĉiukaze suspektindan)...

Jakelino demandis, ĉu "KJEL" kaj "ĜILI" apartenas al la "limigita vortotrezoro de B*E".

"Ĝili" estas tute regula apudmeto : ĝi + li, neŭtrala +

GRAMATIKAĴOJ

persono, kaj mi uzas ĝin por emfazi la neŭtralecon de la Esperantaj radikoj, do mi uzus ĝin ankaŭ en B*E : ĝi servas por forigi la antaŭjuĝon, ke Esperanto estas seksisma lingvo. "Ĝili" estas pli neŭtrala kaj fonetike pli "flua" ol ŝi/li ; krome ĝi povas esti mallongigita - post la unuafoja uzo - per ne ripetado de "ĝili" por la sama subjekto, sed pli simple "ĝi" aŭ "li" laŭ la prefero aŭ la belsoneco.

"Kjel" estas ja neologismo por distingi la identigon : "kjel" disde la komparo : "kiel". Kelkfoje oni uzas "samkiel" en la kompara senco. Sed, krom la pezeco de tiu formo, ĝi havas ankaŭ la malavantaĝon, ke la radiko "sam-" signifas "tute simila" aŭ ankaŭ "identa", do estas la sama afero, la dubsenceco restas ! Eĉ male, "samkiel" estus pli taŭga por la identiga senco, ĉar "tute simila" ne estas simpla komparo, sed jam proksimiĝas al "identa". Mi proponas (sed tute ne trudas) neologismon, ĉar "kjel" taŭgas por simple klarigi kelkajn gramatikajn regulojn, kaj krome mi vidas malmultan diferencon inter :

- 1) Oni traktis la sklavojn kiel brutojn, (N.B. sed bone sciante, ke ili estas homoj), nerekonante ilian rajton al stabila familio.
- 2) Oni traktis la sklavojn kjel brutojn (eble ĉar en la vortaro ekzistis tia difino : SKLAVO = homsimila **bruto**, taŭga por simplaj laboroj ne postulantaj homan intelekton ; ekzemplaj frazoj : buĉi forkurintan s- ; obeigi sovaĝan s- : Proverbo : "Sklavo klera 'stas monstro danĝera").

Ĝiz el Lamark

*L! aperigas ĉi-poste liston preparitan de Ĵansebo, kiu ordigis laŭteme la radikojn uzatajn en B*E.*

*"En tiuj serioj la verkanto de B*E-a teksto povas elekti siajn vortojn kiel la pentristo siajn kolorojn sur sia farbo-breto..." komentas Ĵansebo.*

Al la "ĉenleteranoj" : "Baza Esperanto" estas la lasta temo, pri kiu la red. disponis enkondukon. Estas do nun bonvenaj pluraj enkondukoj por aranĝi la cirkuladon de la venontaj ĉenleteroj.

Al tiuj, kiuj deziras partopreni kiel "ĉenleteranoj" :
Via kunlaborado estas tre bonvena. Ĝi ebligas ankoraŭ pli da diverseco en la elektitaj temoj kaj en la esprimitaj vidpunktoj. Skribu al la red., kiu anticipu dankas vin pro via interesiĝo al la afero.

- (1) **Finaĵoj** : -o, -a, -e, -i, -as, -os, -is, -us, -u, -anta, -onta, -inta, -ata, -ota, -ita, -j, -n.
- (2) **Afiksoj** : homoj : bo-, ge-, -ano, -estro, -ino, -ido, -isto, -ulo.
- (3) aferoj : -aĵo, -aro, -eĵo, -ero, -ilo, -io, -ismo, -ujo.
- (4) agoj : dis-, -ek, re-, -adi, -igi, -iĝi.
- (5) kvalitoj : -eca, -ebia, -enda, -inda, -obla, -ona.
- (6) ĝeneralaj : mal-, -et, -eg, -um.
- (7) **Pronomoj** : mi, ci, li, ŝi, ĝi, ni, vi, ili, oni, si.
- (8) **Tabelvortoj** : kiu, kio, kia, kie, kies, kiel, kial, kiam, kiom, tiu, iu, ĉiu, neniu
- (9) **Nombroj** : unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil, miliono, nulo, plus, minus.
- (10) la, kelkaj, multaj, ambaŭ, ajn, ĉi, mem.
- (11) **Interjekcioj** : ha, ho, jes, jen, nu.
- (12) **Konjunkcioj** : aŭ, kaj, nek, ĉar, se, ke, sed, do, kvankam, ĉu, kvazaŭ.
- (13) **Prepozicioj** : de, da, ol, po, por, per, pro, pri, kun, sen, anstataŭ, je, kontraŭ, krom, laŭ.
- (14) **Adverboj** : pli, plej, plu, ne, tre, tro, ja, eĉ, nur, almenaŭ, ankaŭ, apenaŭ, tamen, preskaŭ.
- (15) **Tempo** : dum, post, frue, jam, ĵus, tuj, nun, ofte, hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ, baldaŭ, ankoraŭ.
- (16) **Loko** : ĉe, al, ĝis, el, en, sur, sub, super, inter, ekster, preter, tra, trans, antaŭ, apud, ĉirkaŭ, for.

NOMOJ

- (17) **Homoj** : patro, filo, avo, nepo, onklo, nevo, frato, kuzo, edzo, parenco.
- (18) profesio : aŭtoro, doktoro, soldato, reĝo, mastro, kolego, turisto.
- (19) diversaj : knabo, viro, infano, sinjoro, fraŭlo, amiko, gasto, najbaro, persono, homo, naturo, dio.
- (20) **Bestoj** : bovo, ĉevalo, azeno, kato, hundo, ŝafo, porko, fiŝo, birdo, abelo, insekto, koko, muŝo, serpento, besto.
- (21) **Fenomenoj** : pluvo, hajlo, neĝo, suno, luno, stelo, nubo, frosto, nebulo, ombro, ondo, vento, vetero, bruo, lumo, fajro, fumo.
- (22) **Homgrupoj** : organizo, familio, komitato, komisio, asocio, klubo, popolo, nacio, polico, ŝtato.
- (23) **Korpopartoj** : kapo, buŝo, okulo, orelo, vizaĝo, haro, kolo, lipo, vango, cerbo, nazo, barbo, frunto, dento, langa.
- (24) korpo, brako, mano, fingro, ungo, kruro, genuo, piedo, ostoj, sekso, dorso, pulmo, koro, brusto, membro, ŝultro, ventro, beko, plumo, vosto, sango.
- (25) **Plantoj** : arbo, floro, rozo, folio, branĉo, greno, herbo, planto.
- (26) **Materialoj** : akvo, tero, aero, ligno, ŝtofo, tolo, fero, oro, arĝento, metalo, karbo, vitro, gaso, glacio, vaporo, polvo.

- (27) **Vestaĵoj** : ĉapelo, jako, pantalono, ĉemizo, ŝtrumpo, ŝuo, tuko, kostumo, kravato, poŝo.
- (28) **Mebloj** : seĝo, tablo, tapiŝo, lito, meblo, benko, biblioteko, ŝranko, tabulo.
- (29) **Transportiloj** : aŭto, buso, biciklo, vagono, ŝipo.
- (30) **Mangaĵoj** : pano, viando, legomo, fromaĝo, kuko, ovo, frukto, pomo, supo, salo, sukero, oleo, spico, butero, mielo, vino, kafo, teo, lakto.
- (31) **Aferoj. 1** : kulero, telero, botelo, glaso, taso, pota.
- (32) **Aferoj. 2** : afero, mono, krajono, kajero, horloĝo, inko, papero, revuo, gazeto, libro, biĉo, fotografio, karto, kupono, paĝo, fakturo.
- (33) **Aferoj. 3** : broso, butono, korbo, skatolo, kesto, kasedo, spegulo, cigaredo, fadeno, koverta, lampo, telefono, ŝnuro, ŝapo, ŝako, pako, maŝino, insigno, radio, pupo.
- (34) **Aferoj. 4** : forko, bastono, flago, kruco, pilko, ŝtono, statuo, ŝago, reto, rado.
- (35) **Konstruaĵoj** : domo, muzeo, kolegio, klaso, poŝto, palaco, teatro, butikoj, universitato, stacio, galerio, hejmo.
- (36) **Domo** : ĉambro, korto, muro, salono, plafono, planko, tegmento, bordo, fenestro, ŝtupo.
- (37) **Lando** : lando, urbo, rivero, monto, maro, strato, placo, ponto, vojo, vilaĝo, ĝardeno, kampo, insulo, fonto, lago, parko, regiono, ĉielo.
- (38) **Lokoj** : nordo, sudo, oriento, okcidento, bordo, centro, rondo, fundo, supro, limo, flanko.
- (39) **Informo** : nomo, aĝo, adreso, ofico, numero, nombro, prezo, cifero, litero, signo, vorto, akuzativo, lingvo.
- (40) **Verkoj** : romano, poemo, artikolo, ĉapitro, problemoj, lecionoj, rubriko, leteroj
- (41) **Aktivecoj** : muziko, ekonomio, arto, historio, literaturo, industrio, komerco, milito, paco, sporto, scienco, poezio, politiko, religio, ĉaso, festo, kongreso, kurso, ekspozicio, krimo.
- (42) **Tempo** : monatoj : januaro, februaro, marto, aprilo, majo, junio, julio, aŭgusto, septembro, oktobro, novembro, decembro.
- (43) „ tagoj : lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato, dimanĉo.
- (44) „ diversaj : jaro, sezono, monato, semajno, tago, horo, minuto, momento, printempo, somero, aŭtuno, vintro, ferio, mateno, vespero, nokto.
- (45) **Sentoj** : timo, intereso, bedaŭro, estimo, feliĉo, ĝojo, ĝuo, kolero, teruro, amo, espero, honto, kompato, kulpo, doloro.
- (46) **Abstraktaĵoj. 1** : voĉo, gusto, imago, memoro, animo, spirito.
- (47) **Abstraktaĵoj. 2** : maniero, rimedo, tempo, loko, spaco, kaŭzo, kondiĉo, celo, metodo, objekto, senco, formo, koloro, direkto, stato.
- (48) **Abstraktaĵoj. 3** : peco, parto, paro, amaso, grupo, serio, kilogramo, metro, kilometro.
- (49) **Abstraktaĵoj. 4** : ideo, fakto, tasko, idealo, regulo, fojo, kutimo, ekzemplo, ordo, moŝto, situacio, sorto, ŝanco, sumo.

ADJEKTIVOJ

- (50) **Koloroj** : blanka, blua, flava, ruĝa, verda, griza, nigra, hela, pala, brila.
- (51) **Aspekto** : bela, dika, granda, longa, larĝa, vasta, plata, profunda, rekta.
- (52) **Kvalitoj. 1** : delikata, densa, dolĉa, firma, freŝa, grasa, mola, peza, pura, rapida, seka, varma, simpla.
- (53) **Kvalitoj. 2** : danĝera, facila, fama, grava, justa, kara, klara, komforta, stranga, utila, vera, luksa.
- (54) **Kvalitoj. 3** : lerta, forta, flua, matura, prava, riĉa, sana, sekreta, sperta, vigla.
- (55) **Kvalitoj. 4** : aktuala, akurata, certa, efektiva, faka, fremda, ĝenerala, ĝusta, konstanta, libera, moderna, neŭtrala, ordinara, publika, speciala, preciza, subita, universala, cetera, ĉefa, propra, reciproka, komuna, meza, lasta, necesa, nepra, plena, diversa kapabla, sufiĉa, taŭga, tuta, aparta, precipa.
- (56) **Rilatoj** : egala, proksima, sama, simila, alia, dekstra, flanko, interna.
- (57) **Moralaj** : kuraĝa, kurioza, inteligenta, ĝentila, honesta, afabla, agrabla, avara, bona, efika, pacienca, saĝa, serioza, sankta.
- (58) **Statoj** : sola, kvietaj, laca, trankvila, sata, gaja, kontenta, fieraj.

VERBOJ

- (59) **Korpaj. 1** : promeni, ripozi, labori, ludi, naĝi, marŝi, flugi, kuri, paŝi, danci, salti, krii, paroli, kanti, manĝi, trinki, morti, naski.
- (60) **Korpaj. 2** : sidi, stari, kuŝi, tusi, ridi, plori, dormi, tremi, soifi, spiri, suferi, peni.
- (61) **Objektoj. 1** : preni, meti, teni, lasi, ligi, dividi, movi, veturi, ŝanĝi, krei, konstrui, miksi, produkti, kolekti, prepari, uzi, komenci, fini.
- (62) **Objektoj. 2** : ĵeti, kapti, tiri, puŝi, ruli, levi, porti, verŝi, semi, atingi, trafi, kaŝi, perdi, trovi, serĉi.
- (63) **Objektoj. 3** : bani, blovi, aranĝi, bari, esplori, eviti, fabriki, fermi, frapi, tondi, fiksi, okupi, pafi, palpi, piki, streĉi, premi, klini, kovri, kuiri, lavi, kombi, marki, ripari, rompi, skrapi, tranĉi, ŝlusi, ŝiri, viŝi, volvi.
- (64) **Objektoj. 4** : akiri, dediĉi, ekzameni, elekti, flari, gajni, gardi, meriti, mezuri, montri, prezenti, izoli, kompari, rigardi, rimarki, vidi, viziti, spezi, tuŝi.
- (65) **Homoj** : amuzi, armi, ataki, bati, defendi, eduki, gvidi, ĝeni, inviti, honorigi, imiti, juĝi, kisi, korespondi, kuraci, minaci, moki, obei, pardoni, puni, renkonti, salutigi, savi, sekvi, vekigi, plaĉi, plendi, batali, konduki, venki, voki.
- (66) **Homoj + objektoj** : doni, danki, instrui, informi, helpi, konsili, konvinki, ordoni, permesi, ŝteli, ŝuldi, mendi, peti, postuli, promesi, proponi, prunti, ricevi, sendi, servi, aĉeti, vendi, akcepti, pagi, rifuzi.
- (67) **Informoj** : anonci, averti, decidi, demandi, diri, dubi, erari, forgesi, kalkuli, kompari, koni, konfesi, kredi, menciigi, opiniigi, pensi, rakonti, raporti, rekomendi, respondi, resumi, ripeti, scii, intenci.

- (68) **Verkoj** : redakti, skribi, traduki, verki, pentri, presi, legi, lerni, solvi, studi, desegni.
- (69) **Diversaj. 1** : atendi, atenti, aŭdi, aŭskulti, ĉesi, daŭri, ekzerci, fari, noti, praktiki, preĝi, iri, veni, zorgi, ŝati, mini, kulturi, vesti.
- (70) **Diversaj. 2** : aperi, boli, bruli, fali, gliti, halti, migri, pasi, progresi, konduti, kreski, resti, silenti, soni, sukcesi, ŝerci, turni, vojaĝi.
- (71) **Diversaj. 3** : aparteni, vivi, farti, agi, ekzisti, kosti, rajti, rilati, senti, signifi, bezoni, konsisti, loĝi, manki, posedi, preti, valori, odori, rezulti, prezidi, diferenci, preferi.
- (72) **Diversaj. 4** : devi, esti, havi, povi, voli, ŝajni, aspekti, volonti, konsenti, konveni, provi, pendi, regi, okazi, konservi.

AL GELAŬTULOJ !

Ĉar parte modifiĝis la listo de la disponeblaj titoloj ĉe SAT-Broŝurservo, kaj ĉar aliflanke baldaŭ venos la reabon-sezono... kune kun tiu ĉi numero la gelaŭtularo (escepte de tiuj, kiuj jam posedas monprovizon ĉe BS/L!) ricevas noveldonitan abonilon/mendilon.

Ni esperas, ke multaj profitos de la reabon-okazo por samtempe mendi por si kelkajn el la disponeblaj tekstoj, aŭ por provi mem disvendi al gekonatoj. Eblas ankaŭ varbi por "Laŭte!" : restas loko por ĉ. 60/70 pliaj abonantoj antaŭ ol atingi la netranspaseblan sojlon : 500-ekzempleran eldonkvanton !

Kiuj helpis por aĉeti JULIAN, tiuj konsideru, ke ili disponas kvazaŭ konton ĉe SAT-BS, el kiu ili povas ĉerpi por ricevi broŝurojn por si aŭ por disdonado/disvendado. Al ĉiuj nian antaŭdankon ! BS/L!

En tiu ĉi numero aperas dua parto de "Alvokoj al la homa konscio". Tiu parto konsistas el :

- * KODO DE SCIENCA DEONTOLOGIO kaj FUNDAMENTA TEKSTO pri tiu kodo. En 84.02.01, 97 personoj kaj 44 asocioj aprobis tiun alvokon, kies ideo estis diskonigita en la 18a de decembro de '80.
- * ALVOKO AL LA HOMOJ... En 84.02.01, 16 kuracistoj, 2 anoj de kuracaj profesioj, 34 estontaj eblaj viktimoj, 1 asocio de kuracistoj, 1 asocio de kuracistoj kaj de anoj de kuracaj profesioj, kaj 10 asocioj de estontaj eblaj viktimoj aprobis tiun alvokon, diskonigitan de Kuracisto Roberto VIALLETEL kaj reprenitan de A.P.J.R. en la 30a de aŭgusto de '82.

Venontnumere aperos tria parto de tiu dokumentaro.



Somero en Florako

La urbeto mole kuŝas en la valo, 500 metrojn alte, inter du altebenoj, kiuj supras je 900 kaj 1000 metroj. La pli altan el ambaŭ ebenaĵoj oni atingas per 6 kmojn longa veturvojo, kiu zigzagas sur la montoflanko ; aŭ piede, rekte tra krutega deklivo. Tiun deklivon mi grimpas ĉiujare almenaŭ unu fojon - sed ĉiun jaron la monto ŝajnas al mi pli alta.

En la valo fluas rivero, en kiun, de post la adoleskeco, mi plongis ĉiutage de frua printempo ĝis finiĝanta aŭtuno. Mi ne plongas plu, nur naĝas, kaj nur en varma somero - kaj ĉiujare mi trovas la akvon pli malvarma.

Mi antaŭvidas la tempon, en kiu, se mi ĝis tiam vivos, mi devos rezigni tiujn du plezurojn post pluraj aliaj, kaj kontentiĝi per tondado de mia razeno, flegado de miaj arboj kaj rozujoj, plukado de floroj kaj fruktoj, en saŭdada kulturado de rememoroj kaj bedaŭroj.

Ĉu do mi plendu ? Mi ja ne estas kompatinda, ĉar mi povas diri kiel Ŝillero :

*Mi ĝuis la teran feliĉon :
Mi vivis kaj amis**

Ŝillero, la aŭtoro de la versoj, sur kiuj Betoveno komponis la Himnon al Ĝojo, kiu ĥore kronas lian Naŭan Simfonion.

Lastjare, pritraktante saman temon (Grimpado, naĝado), mi instigis la maljuniĝantojn, miajn similulojn, ke ili ne tro

* Ich habe genossen das irdische Glück :
Ich habe gelebt und Geliebet.

frue rezignu, ne rezignacie akceptu la maljunigon, sed luktu kaj rezistu kiel eble plej longe. Hodiaŭ mi min turnas al la gejunuloj: Amikoj miaj, aŭdu la vokon de tiuj du grandaj homaranoj, Sillero kaj Betoveno: Ĝojo, ĝojo! Ankaŭ vi ĝuu la teran feliĉon, vivu kaj amu, dum vi estas ĝuipovaj! Pluku la tagon! Kantu kun la studentoj:

Ĝoju ni do, dum ni junaj estas**

Ne atendu, ĝis viaj haroj blankiĝos. Jam nun, ĝuu la vivon: eĉ se iafoje malgaja kaj malesperiga, ĝi estas entute bona kaj bela - sed mallonga. La tempo fuĝas, uzu ĝin, ne lasu ĝin tro frue vin eluzi. Sciu, kiel diras alia germana kanto:

Bela estas la juneco,
ĝi ne revenas, ĝi ja neniam revenas.

Vivu do vian junecon!

Florako en Somero

De post mia kvina jaro mi plurfoje pasigis la someron en Florako, en la hotelo mastrumata de gekuzoj de mia patro - miaj estontaj bogepatroj, sed tion mi ne sciis. La kuzo hotelisto posedis kelkajn rajdo- kaj tirĉevalojn kaj plurajn veturilojn Poste li akiris aŭtomobilon, la unuan en la urbeto. Per tiuj diversaj veturiloj li kondukis turistojn en la Tarno-kanjonon (la famajn "Gorges du Tarn") kaj al aliaj najbaraj vidindaĵoj. La klientoj estis aristokratoj kaj burĝoj, bonstataj komercistoj, el la sudregionaj grandaj urboj kaj el Parizo.

En 1936 tiuj riĉuloj vidis per malfavoraj okuloj la "invadon", la "tajdon" de la "pagataj ferioj". Unuafoje en la historio la gelaboristoj ricevis dusemajnan plensalajran libertempon. Unuafoje ili povis forlasi la aĉajn vivkondiĉojn de la industriaj urbegoj, spiri bonan aeron, vidi la puran bluan de la ĉielo kaj la verdon de la arbaroj, sin bani en la maro aŭ en riveroj. Ili alvenis piede kun dorsosako, bicikle, trajne, jam kelkaj aŭte. La hoteloj afiŝis "kompleta", la tendetoj plenpleniĝis. Ĉiujare kreskis la nombro de tiuj feliĉaj gejunuloj kun iliaj infanoj. En vintro la enloĝantaro de la urbeto apenaŭ superas 2000, en julio kaj precipe aŭgusto multe pli, sen kalkuli la multegajn trapasantojn. Sur la vojoj kaj stratoj svarmas aŭtoj kun registrumeroj de ĉiuj francaj departementoj kaj

** Gaudeamus igitur, juvenes dum sumus.

de ĉiuj okcidenteŭropaj landoj, plus kelkaj venintaj de pli malproksime: Nordafriko, Mezoriento, Usono, Aŭstralio, Novzelando k.a., kelkfoje turismaj aŭtoĉaroj el Japanio. Florako kaj ĝia ĉirkaŭregiono fariĝas rendevuejo de tutmonda popolo. Oni renkontas grupojn da infanoj de feriaj kolonioj - nun multaj proletaj infanoj ĝuas libertempon, ne ĉiuj, bedaŭrinde, malgraŭ la laŭdinda agado de Popola Helpo kaj similaj organizoj.

En tiu bunta amaso, kiom da esperantistoj? Iafoje mi vidis sur aŭtoj verdajn stelojn aŭ flagetojn. Kiom? Kelkaj, certe nemultaj, kaj ne eblaj konjekti pri eĉ proksimuma nombro.

Mi almenaŭ scias, ke en venonta aŭgusto, post la Bordoza SAT-kongreso, kiun ili ĉeestos, nin vizitos geamikoj Gahlin el Stokholmo, kaj tiam nia vilaeto fariĝos esperanta hejmo. Por nelonga tempo, bedaŭrinde.

Relegante mian skribon, mi rimarkas, ke dufoje mi uzis la vorton: bedaŭrinde. Jes, ĉiam restas kelkaj bedaŭroj - sed entute estas notindaj progresoj. Progreso, la ĉiam plilongigantaj laboristaj ferioj, progreso la plioftigantaj interespartistaj renkontoj. Ni do esperu je daŭra progresado en la estonteco - eĉ se ni (bedaŭrinde!) ne povos plu ĝin vidi.

Valo.

Maljunulo rakontas:

Inĝeniero

Laboristo ne havas patrujon. Pro tio mi estis devigita iam "patrolandon"...

Alvenante Parizon, mi pensis, ke en mia antaŭa patrolando oni diras, ke "se oni trapasas la urbon Romo, oni devas vidi Papon"...

Ĉi tio por Parizo min instigis restadi mallongan tempon por viziti diversajn malnovaĵojn, novaĵojn kaj kutimojn de ĉi tiuj - por mi nekonataj - ejoj.

Post proksimume tri semajnoj mia kaso min avertis, ke estas tempo por relabori. Por tio mi pensis tage labori kaj vespere... disdoni la gajnatajn sumojn.

Mi trovis iun butikiston, kiu akceptis mian proponon helpi al li en tiuj laboroj, pri kiuj li ne estas sufiĉe sperta.

Tiel li alvenis kun mi al iu kudristino loĝanta ĉe la kvara etaĝo, ĉar la elektra motoro de ŝia kudromaŝino paneis.

Ĝi estis difektita, ĉar ŝi metis en ĝin karbonon ne taŭgan por fari ŝian laboron. La estro, kiu, sidante sur seĝo, rigardis mian faradon, diris al la kudristino : "Timu nenion, ĉi tiu homo estas "ingeniero" en sia lando. Se neniu sukcesis, li sukcesos."

Kiam la kudristino aŭdis la vorton "ingeniero", ŝi komencis tremi korpe kaj vorte dum ŝi diris : "Lasu la tutan malmunton, kaj diru al mi kiom mi devas pagi... Mi ne plu bezonas tiun laboron..." Kaj ŝi malfermis sian monujon kaj pagis al la estro la petitan monsumon. Ni tuj foriris...

Por mi ĉi tio estis gravega sperto por esti ne plu "ingeniero" sed nur simpla "teknikisto".

Do, de post tiu tago mi komforte gajnis mian vivon kaj eĉ povis esti "iu" en mia metio.

-nn-

La senpaga bileto

"Se mi eliras, mi pagas... se mi ne povas pagi, mi ne eliras...". Tio ĉi estis la principo de la laboristaro en la epoko, kiam mi estis "metiisto".

Iun tagon mi ricevis "senpagan bileton" por du foteloj en tre fama kabareto de Parizo. La prezo por fotelo estis tre multe kosta, ĉar la estraro de kabareto neniam ŝparis elspezojn por ĝiaj scenigoj.

Mi diris al mia edzino : "Ni povas nun ĝui, unu fojon en nia vivo, tian spektaklon."

Por tiu okazo, antaŭ nia eliro, mi enpoŝigis la rikolton en mono de unu monato da laboro.

Se oni havas "senpagan bileton", oni iras per taksio anstataŭ per "metro"... Je la alveno, la kontrolisto nin vidante "bone vestitaj", rekomendis, ke ni aldonu al la kaso malgrandan monsumon por ricevi "bonegan loĝion". Senpaga bileto meritas tiun elspezon... Mi akceptis. Oni devis deponi la survestaĵojn en la vestejo... Ĉu oni povas marĉandi ? En loĝejo alvenis servistino kun "programo"...Belega kajero. Ĉu oni povis resti sen tiu memoraĵo ? Post la longa scenigo estis "paŭzo". Kial ne trinki ion ?

Post la fino - tre malfrua - ne plu estis la "metro". Ni devis pro tio rehejmeniri per taksio kaj pagi duoblan tarifon.

Tiamaniere, nia monata enpoŝiĝo elvapor-iĝis per SENPAGA BILETO...

-nn-

Ĉies volo

matematikaj distroj (1)

KVADRATIGO DE CIRKLO

Matematikaj problemoj, kiujn matematikistoj klopodis/as solvi, estas ĝenerale alireblaj nur de fakuloj; oni bezonas certajn sciojn de matematiko nur por kompreni uzatajn terminojn. Sed ekzistas esceptaj problemoj, kiuj interesas ankaŭ nefakulojn.

"Kvadratigo de cirklo" estas unu el tiuj.

Per "rektilo" (resp. "cirkililo") ni difinu tiun abstraktan ilon, kiu konstruas rektan trapasantan ajne donitajn du punktojn (resp., cirklon kun ajne donitaj centro kaj radiuso-longo). Tiam la problemo "Kvadratigo de cirklo" tekstas jene : "Por ajne donita cirklo, konstruu kvadraton samarean al tiu cirklo, uzante rektilon kaj cirkililon." La problemo, konata jam en Helena epoko, eltenis atakojn de matematikistoj dum 2000 jaroj. Nur en la jaro 1882 C.L.F. LINDEMANN donis finan punkton pruvante, ke la konstruo estas neebla. La pruvo estas faknivela.

Mallonge kaj intuicie dirite, la afero estas proksimume jena. La problemo estas ekvivalenta al konstruo de longo "PI" por donita longo "1". Se longo "1" estas donita, oni povas konstrui longon "n" (entjero nenegativa) kaj ankaŭ "m/n" (racionala nombro). Konstrueblas ankaŭ r (r : racionalo). Tiel rezonante, oni vidas, ke per rektilo kaj cirkililo eblas konstrui tiujn kaj nur tiujn longojn, kiuj estas solvoj de unua-aŭ dua-grada ekvacio, kies koeficientoj estas racionaloj. LINDEMANN pruvis, ke PI ne estas tia nombro (sed transcenda nombro).

La supra difino de la problemo implicas, ke oni uzu la ilojn nur fini-foje. Kvadratigo de cirklo estas ebla, se oni permesas ripeti nefiniajn fojojn (t.e., se ni prenas limeson de konstruitaj kvadratoj kiel solvon).

Kvankam ekzakta kvadrato ne estas ebla, oni povas trovi proksimumajn solvojn. Estus inteligenta distro trovi relative precizan kaj simplan konstruon. Tiurilate mi dankas P.M.G., kiu elfosis interesan proksimuman solvon de iu SPECHT, 1836 (vd. p.26 de L! 52). Ĝi estas okulfrape simpla kaj admirinde preciza; miaj kalkuloj konfirmas ciferojn de Paŭlo (p.28 de L! 53), tamen lia dua cifero ŝajnas plumeraro de 0,999 999 777

— Jamo —

La cirklokvadrato : ĉu tabuo ?

Kdo Anonimo B.G.D. obstine pretendas, ke la problemo pri la cirklokvadrato estas solvebla, sed solvon li ne prezentas. Li mem konfesas, ke lia "elturniĝo" pere de $\pi = 3,1416$ ne estas vera solvo. Fakte 3,1416 ne estas rigore ekzakta valoro, sed nur proksimuma kun 3 ekzaktoj decimaloj, la kvara situas inter 5 kaj 6. En la daŭro de jarmiloj oni uzadis pli kaj pli proksimumajn valorojn. La lasta rekordo apartenas al angla matematikisto William Strans, kiu kalkulis ĝin kun 708 decimaloj, el kiuj 707 ekzaktoj. Estas pruvite, ke ĉiuj ciferoj sin prezentas laŭhazarde, do neantaŭvideble, do ke la nombro π estas transcenda, t.e. ne kalkulebla per la kvar aritmetikaj fundamentaj operacioj. Tion definitive demonstris en 1882 Ferdinand Lindemann en Munkeno. Sekve la kvadrato de l'cirklo estas nerefuteble neebla.

Tiu fakto, cetere, sen pedanta demonstrado, estas intuicie konstatabla per konsidero de cirklo kun regulaj poligonoj enstrekita kaj ĉirkaŭstrekita, kies nombron de lateroj oni senfine multobligas. Videble la perimetroj de tiuj du poligonoj pli kaj pli interproksimiĝas, sed neniam interregaliĝas, kaj la cirkonferenco de la cirklo restas inter la du perimetroj, kiel neniam atingota komuna limo. Ĉar la perimetroj de la du poligonoj estas kalkuleblaj, ĉu ekzakte ĉu proksimume, oni povas laŭvole duobligi la nombron de iliaj lateroj, kaj do ricevi valoron de π kun pli kaj pli granda nombro da ekzaktoj decimaloj, sed tio ne ŝanĝas la fundon de la demando.

Nia obstina kvadraturisto do perdu sian iluzion. Sed ni povas konsenti al li konsolan konstataĵon : vere estas, ke en la pli-multaj okazoj, la valoro $\pi = 3,1416$ sufiĉas por la praktikaj bezonoj. Feliĉe ni vivas en mondo, kie ne necesas matematika rigoro : sufiĉas relativeco. En tiu senco la kvadrato estas ja efektive realigebla. Nek dioj nek anĝeloj, homoj ni estas. Ni sciu modeste kontentiĝi per nia homa naturo, je nia homa

skalo, kaj humile konfesi nian senpovecon. En la limoj de tiu senpoveco, al ni fiksitaĵoj de la rigoroj matematikistoj, ni praktikistoj kiel Kdo B.G.D. Eymet trankvile daŭrigu niajn proksimumajn efektivecojn.

Valo

PRI SOLIDARNOŜ EN POLLANDO, MALLIBERECO EN KELKAJ ALIAJ LANDOJ, KAJ FRENEZA LIBERECO EN NIAJ KAPITALISTAJ LIBERALAJ LANDOJ

Tio estas speciale por mia samideanino, porpaca aktivantino Jakelino. Hodiaŭ, mi aŭdis informon en Franca Televido pri la forlaso el Sovetio de konata scenigisto, kiu elektis "Liberecon" : li ankoraŭ ne scias kien li iros, sed oni aldonas, ke tio estas preskaŭ sendube en Usonon. Ĉu vi kredus, ke li povus iri en iun malgrandan landon ? Vere, mi opinias, ke en Sovetio la scenigistoj ne povas facile elekti la film-scenaĵon, kiun ili juĝas interesa por la rigardantoj de sia lando aŭ alilandanoj ! Ni ĉiuj aŭdis pri la reguloj de la sovetia akademiismo, kaj ni vidis la pentraĵojn de pentristoj, la filmojn de scenigistoj, ktp, de tiu lando ! Sed en liberaj landoj, kie la filmproduktantoj estas ne nur la ŝtato, sed multnombraj, kaj do ĉi tie vi povus facile trovi la necesan produktonton, ĉu vi kredas, ke, ekzemple, iu kontraŭmilitista filmo povus esti farita ; ĉu vi kredas, ke vi povus vidi kontraŭkapitalistan filmon aliloke ol en studĉambrego ? Sed iu forkurinto el socialismaj landoj ricevos, almenaŭ dum kelkaj jaroj, multan helpmonon en Usono, ĝis lia afero estos tro malnova kaj ne plu interesos la popolaĉon kaj ne plu produktos monon !

Por kompletigi la informon - ĉar ĉe ni la informo estas, ĉu ne? komplete - la parolanto memorigis al ni multajn ekzemplojn de forlasintoj el Sovetio : sportaj ĉiamvenkintoj, dancistoj kaj dancistinoj, iu el ili eĉ elektis "liberecon" dum lia edzino pli ŝatis reiri al tiu infera lando ! Sed la parolanto ne diris, ĉu la kialo de tiuj foriroj estas ankaŭ la sovetia akademiismo, kiu kontraŭagas ilian sportpraktikon aŭ iliajn baletojn. Mi tre malsprite kredas, ke kurzo de Dolaro iomete interesas la liberecelektantojn, ĉu ne ankaŭ vi ?

Paŭlo

LINGVAJ PARALELISMOJ

Lastatempe nia revuo ricevis plurajn leterojn de legantoj, konfuzitaj de la propono anstataŭigi la prefiksoidon VIR- (kiel en "vir-araneo", ekzemple) per nova seksa sufikso.

Iuj demandis, ĉu laŭ mi la ŝanĝo estas vere necesa, aliaj tute ne vidas senc-diferencon inter la proponata formo kaj tiu ĝis nun uzata : kial do ŝanĝi ?

Nu, por taŭge respondi mi devas antaŭ ĉio klarigi la intiman signifon de la vort-radiko VIR.

Nia Esperanto heredis ĝin de la "latina" lingvo, kie ĝi havas la fundamentan sencion "plenfort" - kion pruvas la parencaj radikoj, same hereditaj de Esperanto : VIRTĀ (morale plenforta), VERDA (= "viridis", vegetaĵe plenforta), VIRGA (plenforta ĉar nesubmetita, ne ekspluatita), VIRUSO (venene plenforta).

La vort-radiko VIR- montras samtempe la plenforton seksan kaj la plenforton aĝan.

Pruve, oni jam uzas kelkfoje "VIRULO" kaj "MALVIRULO" por montri la pli kaj la malpli potencon en samseksama paro. En kontraŭseksismaj rondoj oni eĉ parolas pri "MISVIRULOJ" kaj nomas "misvireco" (ne plu "vireco") la misuzon de l'plenforto kontraŭ la gemalviruloj.

Mi konkludas el tio, ke la signifo de l' radiko estas tre klara en nia subkonscio, kaj ĝuste pro tio ni emas rifuzi ĝin ŝanĝi en la proponatan nur-seksan sufikson !

Sed, se ni volas, ke Esperanto fariĝu UNIVERSALA lingvo ni devas oferi sur la altaro de nia idealo ne nur la nacian, sed ankaŭ la seksan egoismon.

Se ni rekonas la principon, ke "potenco estas praveco", kial do ni rifuzas la superregadon de la nacia lingvo nuntempe plej potenca ? Ŝajnas al mi aŭdi la voĉon de leganto : "Sed ni viroj ja estas la pli forta sekso, tio estas FAKTO, ne seksisma antaŭjuĝo..."

Bedaurinde, tiun leganton mi devas kontraŭdiri, ĉar sur nia propra Tero ekzistas multaj specioj, ĉe kiuj la tiel nomata "vira" sekso estas tamen la pli malgranda kaj malforta.

La leganto eble respondos, ke tio ne gravas ĉe bestaj specioj, ĉar "vira" rilatas propra nur al la personoj.

Mi konsentas pri tio, sed ŝi devus memori, ke ekzistas aliaj Realoj krom la nia, aliaj Teroj kaj, eĉ, aliaj Esperantoj.

Kvankam la sciencistoj klopodas elekti por estonta esplorado nur tiujn "paralelajn" Terojn, kie ekfloris ia Esperanto simila al la nia, iŝi jam trovis, ke sur pluraj el tiuj la Majstro

estis efektive ... viruĉo, tamen li faris pli-malpli la samon, kiel ŝi faris sur nia Tero !

Do mi konsilus al la leganto malfermi sian menson al la diversaj realoj kaj akcepti la novan seksan sufikson -IN- (karese : -NJ-) por la "vira" sekso, paralele al -UĈ- (karese : -ĈJ- por la uĉa...

Kaj ne opiniu, mi petas, ke mi estas ia fanatika femuĉisto: mi estas nur Esperanta realisto - kaj, mia-espere, estonta alireal-esploristo (kiam do oni fine decidus komenci la esplradon??).

Lijan Hajjant

(Lijan Hajjant vivas en granda urbo de la regno Maricio, kiu ne troviĝas sur nia Tero, kompreneble. Ŝi estas viro laŭ la difino (ankaŭ) de nia Plena Vortaro de Esperanto, ĉar en ŝia mondo la inoj de la superaj specioj enmetas la ovulojn en la ventro-poŝon (aŭ marsupion) de la uĉoj, kiuj ilin fekundigas; el la ovoj disvolviĝas idinetoj, kiuj kreskas en la marsupio de la patr(uĉo), kiel okazas ankaŭ sur nia Tero ĉe la specioj de la mar-ĉevaletoj.)

Antaŭ la Komenco

"Ni devas pensi kaj agi kiel teraj loĝantoj amataj de Dio por la Dia Gloro.

Rolando Tierce (el "S-ulo" n°948. Majo)

Ĉe la Komenco, diras la Biblio, Dio kreis la Ĉielon kaj la Teron. Sed ĝi ne klarigas pri la kialo de tiu kreado.

Cetere, tio estintus ja senutila. Sufiĉas iomete pripensi, por kompreni, ke Dio ne plu povis elteni sian ĝistianan nirvanan staton. Kiu povus eĉ riproĉi al Li Lian Fiagadon? Ĉar tia estas la Di-kreado. Per ĝi Dio detruis la Perfektecan staton, kiu estis Sia en senkomenca kaj senfina Eterneco kaj en senlima Vasteco, por anstataŭigi ĝin per nia malperfekta Mondo enfermita en vivociklo kun limo, komenco kaj fino, kiujn ni nomas Tempo, ero de Eterneco, kaj Spaco, ero de Vasteco.

Perfekteco povas esti nur en stato de nekreiteco. Ĉar Dio estas Ĉionscia, do, Li ne povis ne scii pri la fieco de sia agado. Kial do Li kreis malperfektan Mondon? Nu, kiel mi

diris pli supre, necesas kompreni Lin. Nenio ekzistis krom Li... kaj absoluta silento. Neniu alia kun kiu Li povus paroli. Ne nur estis Li en absoluta silento, sed ankaŭ en absoluta mal-lumo, ĉar Li ankoraŭ ne diris : "Estu Lumo!". Ankaŭ en absolutaj malvarmo kaj senmoveco Li estis, ĉar Li ankoraŭ ne eligis el Si la Materion. Do, estas ja facile kompreni, ke, kvankam nekreita, perfekta kaj Ĉionscia Dio, Li ne plu povis elteni tiun eterne senŝanĝeman staton.

Kaj subite Li cedis, Li ribelis kontraŭ tiu tro nirvanecan ekzistadon, kaj, sen antaŭplanado de Sia Agado, Li kreis la Mondon, farante ĝin, kiel estas dirite en la Biblio.

Instigate de la deziro ĉion ŝanĝi, Li komencis detrui la en Si Establitan Ordon. Sed, oni eble objekto, kiel nekredito ja povas detrui Sin mem ? Kiel ĝi eĉ kapablas agi ? Tutsimple. De kiam Li ekkonsciis pri la neeltenebleco de Sia Stato, Li ekkonsciis ankaŭ pri la dualeco de Sia Propra Naturo, kaj konstatis, ke Li estas kun "Vira" Naturo : Eterneco, kaj "Virina" Naturo : Vasteco. Li konstatis ankaŭ, ke Sia Eterneca Naturo estas memvola kaj pozitiva, dum Sia Vasteco estas intelekta kaj negativa, kaj ke, pro tiu duala poluseco, ambaŭ Siaj Naturoj altiras unu la alian kaj tenas Lin en Eterna Stato de Unueco kaj Perfekteco. Do, la Unua Paŝo al Statoŝanĝo estis : separi Siajn du male ŝargitajn Naturojn. Tiucele, Li, el Sia Vasteca Naturo, apartigis parton el la negativa Kvinesenco, pensante : "Per tia malfortigo de Mia Negativeco, kiu altiras Mian Pozitivecon, Mi kreos en Mi misekvilibron, kiu ĉesigos tiun Mian Monotonan Staton, kaj Mi povos laŭvole elekti alian."

Sed tiu apartigita parto de Lia negativa Kvinesenco, ne plu subtenita de Lia Pozitiveco, fluis kiel akvo el renversita botelo, kaj provis reokupi sian antaŭan lokon en la Vasteco de Dio. Tion vidante, Dio diris : "Se tia provado daŭros, tiu Diebla parto de Mia negativa Kvinesenco relokigos en Mia Vasteco, kaj Mia antaŭa Stato tiel monotona rekomenciĝos, do necesas malhelpi ĝin". Kaj por ĉesigi la etendiĝon de la apartigita negativa parto, Li prenis parton de Sia Pozitiva Kvinesenco, kaj per ĝi starigis kvazaŭ muron ĉirkaŭ la etendiĝanta parto de la negativa Kvinesenco apartigita en Li, dirante : "Ĉar ambaŭ male ŝargitaj partoj de Mi altiriĝas, tiel ili unuiĝos kaj fiksiĝos en aparta loko de Mia Vasteco, kaj denove Mi povos laŭvole ŝanĝi Mian Staton."

Tiel estis separatitaj kaj kreitaj la relativa Spaco, ero de la Dia Vasteco, kaj la relativa Tempo, ero de la Dia Eterneco el kiuj poste Dio faris la Materion, la Ĉielon kaj la Teron.

Kial ? Tial, ĉar pro la due apartigita parto de Lia Pozitiveco, Liaj ambaŭ Naturoj male ŝargitaj denove ekvilibriĝis kaj altiriĝis. Kaj Dio sopiris : "Nun Mi konscias, ke ĉia provo ŝanĝi Mian Staton estos vana. Mi estas la Eternulo, sen similitulo antaŭ Mi, kaj, pro tio, kondamnita per Mi mem resti eterne Sola, ĉar Mi estas la Estinto, la Estanto kaj la Estonto en senkomenca kaj senfina Eterneco, kaj en senlima Vasteco. Ĉio ekzistebla povas aperi kaj malaperi nur en Mi. Mia Sorto estas ja senelira. Sed nun Mi ne plu estos tute Sola. Tiu parto de Mi, kiun Mi apartigis en Mi, estiĝos la Celo de Mia senlaca Zorgado. Mi faros ĝin tia, ke ĝi ne suferos la samajn monotonajn Perfektecon kaj Solecon, kiuj konsistigas Mian Eternulan Sorton. Mi ja zorgos, ke ĝi estos duala kiel Mi, sed ankaŭ blovos en ĝin Mian ribeleman Koscion, kaj tio okazigos, ke, kiam la relativa pozitiveco kaj la relativa negativeco, kiuj ĝin konsistigas, alvenos en stato de perfekteco kaj de konstanta harmonio, ambaŭ partoj reciproke sin repuŝos, apartiĝos kaj forfuĝos unu de la alia. Tiel estos kreitaj la kondiĉoj por nova vivociklo kaj novaj vivoformoj, kaj tiel estos venkita la monotoneco de Mia Eterna Perfekteco."

Tiel decidiĝis la Eternulo, kaj, senprokraste, Li denove apartigis la relativan pozitivecon kaj la relativan negativecon, kaj, per tiu lasta malfirmece, likveca, Li, iom-post-iome, malfirmigis la pozitivajn parton, lasante tiun refirmiĝi, por denove malfirmiĝi ĝin per nova dozo da malfirma negativeco. Kaj, pro tiu senlaca zorgado, kiu iel similis al batalo de klifo per la marondoj kaj daŭris sennombrajn jarmilardojn, sed por Dio tio estas kvazaŭ sekundo por homo, la firma pozitiveco malfirmiĝis, dum la malfirma negativeco, ĉiam serĉanta novan apogilon, novan vehiklon, pli kaj pli firmiĝis, ĝis ambaŭ tiel similiĝis, ke ne plu eblis distingi iun de la alia. Ĉiu atompartiklo pozitive ŝargita kuniĝis kun unu negative ŝargita, kaj tio formis en la senlima kaj malluma Vasteco de Dio apartan brilan insulon, kvazaŭ travideblan nebulon, kvazaŭ vitrecan maron. Tiel estis kreita la unua Materio, fonto de ĉiuj ekzistoformoj de nia relativa Mondo, kaj tiel estis atingita la stato de perfekta Harmonio en la kreita Universo.

Kaj Dio tiam diris Sin : "Jen la Materio, Spegulo de Mia Eterneco kaj de Mia Vasteco, kuŝas en harmonia stato, kiu eterne daŭros, se Mi ne zorgas pri tio, kaj tiu relativa Mondo spertos kiel Mi la monotonecon de Eterna Perfekteco. Jen Kion Mi faros : Mi enŝovos Mian Penson per Mia Parolo en ĉiujn ĝemelajn partiklojn de la Materio, por ke Ĝi inside

disigu ilin kaj frontigu ilin unu al la alia. Ĝi fariĝu por ili kvazaŭ detruanta fajro, universala Radiado senĉese bakanta kaj rebakanta la Materion, deviganta Ĉien evolui de Luma stato per detruo de la Materio kaj liberigo de la Energio, al denove materia stato per cindriĝo de la luma Radiado. Tiel de atompantikla polvo ĉio estos formita, kaj al atompantikla polvo ĉio revenos.

Tia estu la Senĉesa Procezo de la Materia Evolucio por la jarmiliardoj de la jarmiliardoj.

Eterne la stadioj de malkomponiĝo kaj de rekonponiĝo de la Materio laŭvice sin sekvos naskante unu la alian. La malkomponiĝa stadio estos nomata Lumo, Tago, Vivo, Vekiĝo, Infero, kaj la rekonponiĝa Mallumo, Nokto, Morto, Dormo, Paradizo. Kaj tio okazos pro la efiko de Mia parolo por ĉiam enŝovita en la Materion, kiu fariĝos nemortema magneta memoro en la plej etaj atompantikloj. Pro Ĝi ĉiuj materiaj korpoj povos, post malkomponiĝo, rekonponiĝi.

Kaj Dio prononcis la Eternan Leĝon de la Materia Evolucio: "La Materio senĉese evoluadu en radiadaj sferoj el malsamaj ondolongecoj kaj densecoj, de materia al spirita stato kaj de spirita al materia. Por transpasi de iu sfero al alia, ĉiu atompantiklo akiru aŭ perdu Lumon. Tiel, ĉiu Esto memestu nuklea eksplodo, liberiganta la propran Energion (kiu estas Mia Parolo, Lumo kaj Gloro, enŝoviĝinta en ĉiuj atompantikloj kaj fariĝinta Magneta Memoro), en limoj de propraj Tempo kaj Spaco difinitaj kaj truditaj de siaj apartaj Regno kaj Specio."

Tiel Dio diris, kaj Lia Parolo fariĝis Memoro kaj obeenda Komando por ĉiu atompantiklo kaj por la jarmiliardoj de la jarmiliardoj.

Tion konceptinte kaj dirinte, Dio vidis, ke ĝi estas bona kaj tiam Li komandis: "Estu Lumo!"

Kaj Lia Parolo fulmis al ĉiuj atompantikloj, enŝoviĝis en ĉiun en ili, kaj devigis ilin fronti unu la alian, ĝis pro tro daŭra kaj intima "kunfrontado" iliaj malaj ŝargoj intermiksiĝis, fariĝis similaj, kaj tiam subite repuŝiĝis kaj forfuĝe diseriĝis iuj de la aliaj. Tiel kreiĝis la Origina Nebulozo, el kiu fontis ĉiuj aliaj. Kaj tiel estis kreitaj la Ĉielo kaj la Tero, tio estas: la Universo, la Galaksioj, la Sunsistemoj kaj la Planedoj, inter kiuj estas nia Tero, kiu, kiel ĉio materia, ĉiam sopiras al reveno en la eternan Ripozon de Dio, al la antaŭa perdita stato, sed vane. Ĉar ĉiam la Parolo de Dio resonas ĉe la taŭga momento kaj aŭdigas la Eternan Komandon: "Estu Lumo!". Kaj al tiu Komando de Dio, la Eternulo, neniu atompantiklo kapablas rezisti, ĉar tiu Komando fontas el la jar-

LA LASTAJ HOROJ

Malfrue estis kaj sinjoro K. sentis malvarmon en la manoj. Mi devus aĉeti gantojn, li pensis. Senkomprene li gapis tra la disbatitaj vitroj de peza pordo. Malantaŭ ĝi montriĝis stacidomo. Estis videble, ke ĝi ne plu funkciis. Jam mallumo disvastiĝis en la antaŭhalo kiel societo de funebra gastaro. La amasiĝintaj polveroj kaj lastaj signoj de ia paliĝinta eleganteco solviĝis majeste en la nigro, kiu ŝajnis eĉ iom pli trista.

Kiam li estis enirinta, sinjoron K. ekkaptis malagrabra sento. Estis tiel, kvazaŭ iu ferme premus la pordon post li. La soleco ekatakis lin.

Verdire sinjoro K. nur intencis iri al la stacidoma horloĝo. Kaj traserĉante la mantelpoŝojn pro alumetoj, li subite rememoris pri horloĝo, kiu ne posedas montrilojn. Iu monstra, kiĉa aĵaĉo kun trumpetantaj anĝeloj. K. devis rideti pri la stulta supozo, ke ankaŭ la horloĝo en tiu ĉi aĉa stacidomo ne havu montrilojn. Sed spite al tio li ĉesigis la serĉadon...

Ĉu ne ĉiukaze estas tro malfrue? Ĉu ne estas absurde eĉ nun serĉi la ĝustan tempon?

K. palpis sin reen al la vitropordo kaj paŝis firme sur la neĝon. Turnante sin, por adiaŭi la fantoman stacidomon, li ekvidis lumigatan fenestron, alte super la pordo. Antaŭ ol li povis miri pro tio, ke la stacidomo havas loĝantojn, la fenestro estis malfermata de svelta virino. Tuj li ekkonis

(daŭrigo p. 52)

ANTAŬ LA KOMENCO (daŭrigo)

miliardoj de jarmiliardoj kaj el la Vasteco de Dio trans la intergalaksiaj interspacoj, kaj estas mem la ekzistokialo de la Materio kaj la Sonorilo, kiu resonas komence de ĉiu nova Vivociklo kaj de la Biblio.

Tiel estis antaŭ la Komenco. Kaj tiu, kiu ne agnoskas tion, neniam alvenos al la Koncepto pri "la Tri Mondo", kaj al vera Konscio pri la Realeco, kiu estas Vero, Vivo, Amo, Morto kaj Renaskiĝo... kaj iluziilo de Dio por la homoj.

Tiel diris Julio Ŝtrumpfo, la Frenezulo.

Kaj ĝin fidele raportis

B.G.D.

la Anonimulo en Eymet
(1984/05/06)

ŝin kaj estis strange tuŝata. Ĉu ne estis la... ? Jes, vere. Tie supre mokridetis la malbela knabino el la infanaĝo. Kiom da jaroj forpasis de tiam ? Homaaĝo... homaraĝo ?

Li naŭzis sin pro ŝi, ĉar ŝi ĉiam estis malpura. Ĉiufoje, kiam ili renkontiĝis enkoridore, ŝi kaŝiris kulpkonscie rigardante preter li. Ŝi estis ĉirkaŭ la oka infano el kontraŭsocia familio, loĝinta apud liaj gepatroj. Fi, la malpurinfano kun la fetoreca odoro, fluanta el la najbarloĝejo ! Estis kompreneble ne sole la malbona odoro, kiu tiam ĝenis lin. Estis eĉ pli la konvinko, ke li mem apartenas al pli alta homspeco.

Nu, estis antaŭlonge.

La malpurinfano, sinjoro K. trovis, kondukis mirege memkonscie. Ja, en la flavo de la ĉambrolampo ŝi aspektis preskaŭ bela. Per trankvila voĉo kaj tute sen la timema infanrigardo ŝi postulis de sinjoro K., ke li venu supren.

Singarde li diris : "Kiel mi supreniru ?"

"Iom pli laŭte. Mi ne komprenas vin."

"Kiamaniere mi venu supren ?"

"Iru tra la vitropordo kaj poste dekstren. Mi akceptos vin."

"Kio... se mi ne emas", li taktikis.

"Ne demandu. Iru tra la vitropordo kaj poste dekstren, ĉiam dekstren, sinjoro mia, mi atendos vin."

K. estis konfuzata. Kio okazas ĉi tie ? La stacidomo kaj la malpurinfano... sufiĉe stranga la tuto. Kial tiu invito ?

La virino fermis la fenestron kaj K. ekbruligis cigaredon. Denove li ŝovis sin tra la pordo kaj antaŭen palpiĝis. Alveninte supre, li ĵetis la cigaredon sur la ŝtuparon. La virino ekkaptis lin je la brako kaj gvidis lin en la loĝejon.

"Ne parolu", ŝi diris preskaŭ flustre, "ankoraŭ momenton, tiam ni estos atingintaj la celon."

K. opiniis sonĝi. La harmonia intimeco de tio, kio okazis, metis lin en staton de feliĉo. Tiel certe estas, se oni flugas, li pensis. Ĉia rigideco solviĝis en li. Li sentis subite dankemon kaj karesemon por la malpurinfano, kiu forvokis lin de sur la strato. Varmega ondo trairis lian korpon kaj mistera vorto envenis lian kapon, la vorto : sopiro. Jes ja, la sopiro al amo, li envortigis sian senton.

Antaŭ la lito ŝi diris : "Estu singarda. Malrapide suprenrampu. Estas lito kvazaŭ kun dua etaĝo."

K. palpe ŝovis sin laŭ la malvasta lignoŝtuparo supren. Sen heziti ŝi sekvis lin kaj poste premetis sin al li. K. kroĉiĝis al ŝi, kvazaŭ li timus perdi sonĝovizion... Baldaŭ iliaj korpoj kunfandiĝis avidsopiraj je karesoj...

Vekiĝante, K. aŭdis ĵazmuzikon el la apuda ĉambro. Kiel estus tio, ĉiam resti en ĉi lito, firmteni la malpurinfanon, li reve pensis. Sed kiam li turnis sin al ŝi, ŝi jam estis malaperinta...

K. ne tuj komprenis la situacion. Estis freneze. Li ja ne kuŝis en lito. Ne... tute ne. Rigardo sur la spegulon de tualeta tablo plene sufiĉis por ĉion ŝiri en mistifikan nebulon. Lia spegulbildo rigardis lin senkrede. Gapis viro en mantelo al li. Viro kun laca vizaĝo.

Netolereble laŭte kriis nun la muziko el la proksima ĉambro. Kriĉantaj akre sonaj muzikeroj. Kiam K. malfermis la pordon, el kies direkto inunde enpenetris la muziko, liaj timpanoj preskaŭ disŝiriĝis. En la eta ĉambro ekzerciĝis kvin aziaj muzikistoj kun senmovaj vizaĝoj. La frapinstrumentisto, sidanta vidalvide al la ĵus malfermita pordo, gapis tra K. kvazaŭ tiu ne ekzistus.

Kio estas tio ? K. pensis. Provludo ? Infermuzika provo ? La laŭtparoliloj muĝis kvazaŭ ili estus disflugontaj. Ŝokorkestro estas tio, pensis K. La murflanko malantaŭ la muzikistoj estis plenigata de filmo. Ĉu eble estas la muziko por la filmo ? La filmo montras la efikojn de neniigarmiloj, tiom multe K. komprenas. Sed la ĵazhaoso dishakas ĉiun penson pri la filmo. Koreo, trovis K.

La filmo finiĝis abrupte kiel la muziko, sed la finbildo restis videbla iomtempe. Ĝi montris altajn montojn da mortintoj. Sur la mortintoj are kirlis rozkoloraj vermoj...

La muzikistoj kliniĝis antaŭ imaga publiko kaj retiriĝis. La muzikiloj perdis siajn konturojn. Silento... dum eterneco. K. fermas la okulojn. Malferminte ilin denove, li staras per unu fojo antaŭ la peza stacidoma pordo. K. seniluziiĝis.

Estas freneze, ke la neĝo malaperis. K. decidas ekmarŝi. Li marŝas kun amara sento. Kie estas do la malpurinfano ? Ĉu demandi pri ŝi ? La stratbetono montriĝas okulfrape glata. Denove la malvarmo ekatakas sinjoron K. Neniu videblas, kiun li povus demandi. Kie estas do la homoj ? li pensas malesperante. Nur nun li meditas pri tio, ke ŝi havis iun nomon... Kiun ?

Lauirante garaĝon, li ekvidas viron en iu el ili. La viro estas vestita per serurista kostumo.

"He, sinjoro !"

"Jes, kio...?"

"Ĉu vi konas sveltan virinon, loĝantan en la stacidomo ĉe la urboparko ?"

"Kie ? En la stacidomo...?"

"Jes... nu... do... pardonu min, diru, mi petas, kioma horo estas ?"

La bluestito sin turnas al li. Lia vizaĝo estas pala kiel kranio de mortinto. Malĝoja rideto ĉirkaŭludas lian buŝon. Kiam li ekparolas, K. terurite skuigas. Tio estas la fino, li pensas.

La viro parolas tre lante. Kaj... dume rampas rozkoloraj vermoj el lia buŝo.

"Estas tro-o malfr-u-ue, sinjo-o-ro."

Rapide disvastiĝas la vermoj sur la vizaĝo de la viro. Li teren falegas kaj lia korpo ruliĝas flanken. Tro malfrue, K. pensas ankoraŭ, antaŭ ol la morto ankaŭ lin ŝiras kun si. Rozkoloraj vermoj rampas nun ankaŭ el lia buŝo. Denove la vermoj disvastiĝas... Estas ŝoke. Nur ili vivos plu.

Hagen Hirte

El "Anekdotoj pri Gabrovanoj"

Kune kun sia infano gabrovano gastis ĉe parencoj en vilaĝo. Kiam ili devis reveni hejmen, la onklino diris al la infano :

- *Donu viajn manetojn, por ke mi metu nuksojn.*
- *Donu la nuksojn al mia patro - diris la gabrovaneto.*
- *Kial ? Ĉu vi ne ŝatas nuksojn ?*
- *La manoj de mia patro estas pli grandaj.*

La 22an kaj 23an de septembro 1984 okazos en Angers la 4a nacia kunordigado kontraŭsimbioza. Temas pri la "simbiozo inter armeo kaj lernejo" decidita de sinjoroj Savary (franca eksministro pri edukado) kaj Hernu (plua ministro pri defendo). Informojn urĝe petu de : Collectif anti-protocole, ĉe Thierry Ducanetz, BP 401, 49004 ANGERS Cedex. La francaj laŭtuloj, kiuj opinias, ke la minaco militistigi la mensojn de lernejinfanoj estas almenaŭ tiom pripensinda, kiom la situacio de la privataj lernejoj, povas aboni "ramassis d'infos", kontakto ĉe: C.O.T., BP 229, 81006 ALBI Cedex.

URĜA INFORMO POR FRANCAJ GELAŬTULOJ !

Lingvo ne estas senorda amaso de vortoj, sed, almenaŭ en sia pura esenco, logika rezonadesprimilo, kies elementoj estas karakterizataj de la funkcio, kiun ĉiu plenumas, kio ne dependas de ies kaprico aŭ arbitro. Laŭ tiu funkcio la gramatiko studas, analizas kaj difinas la vortelementojn per la morfologio kaj la frazelementojn per la sintakso. Malgraŭ la senfina varieco de la lingvoj, tiuj funkcioj troviĝas en ĉiuj, eĉ en la plej primitivaj, sovaĝaj, tute ne kulturitaj. Se en la etniaj, naturaj lingvoj oni uzus regule ĉiam apartan elementon por ĉiu aparta funkcio kaj kun klara, memkomprenebla signifo, ĉiu ajn tia lingvo povus esti uzata kiel internacia kaj neniam necesus krei artan. Sed la naturaj lingvoj evoluas konstante per koruptoj, sub la influo de fremdaj, precipe imperialismaj lingvoj kaj ankaŭ pro miskutimoj kaj enkonduko de konvenciaj idiotismoj. Ekzemple, en la kataluna, ne nur oni povas, sed eĉ oni konsideras bonstila uzi preteriton kiel kondicionalon, kaj sufiĉis la dekadencaj 40 jaroj de subpremado de la faŝisma diktaturo por tio, ke la junaj generacioj enkondukis la uzon de kondiĉanta kondicionalo, kiel rezultan kondicionalon; kaj ankaŭ la hispana oficiala (kastilia), sub la influo de la modernaj komunikiloj rapidege degeneris al tio, ke oni uzas adverbos kiel adjektivos kaj oni diras, anstataŭ "preskaŭ la tuto", "la preskaŭ tuto", kaj anstataŭ "praktike la tuton", "la praktikan tuton", kaj ŝajnas kvazaŭ ne plu ekzistus gramatikistoj en Hispanujo, ĉar neniu reagas.

Ankaŭ en Esperantujo. Oni kredas esti fidela al la Majstro konsiderante la artan lingvon kvazaŭ ĝi estus natura kaj papage imitante la tradiciajn erarojn sankciitajn de la kutimo, kiel okazas en tiuj; "evolugante" ĝin per koruptoj, kiel tiuj evoluas aŭ "riĉigante" ĝin per intuiciaj, spontanaj eltrovoj sen ia analizo, ne kompreninte ke la verko de Zamenhof estis perfekta en sia strukturo kaj enhavis ĉion necesan..., escepte de detalaj, senesceptaj reguloj, kiuj tamen troviĝis imalentaj en ĝi. Ni projektas prezenti ilin plej simple al la legantoj de "Laŭte" en serio de mallongaj artikoloj.

Tiuj ĉi reguloj baziĝas sur la Fundamento, sur la logiko, kiu estas universala, kvankam ne ĝenerala; sur la striktaj, ne variaj leĝoj de la gramatiko, kaj sur tiu de analogio, tial ke en lingvo arta nenio povas pravigi la esceptojn kaj estas evitenda kio ne estas ĝenerala aplikebla. Sur tiuj ĉi bazoj, la internacia lingvo estas, kiel devas esti, firma kaj stabila kiel roko. Novaj rokoj multfoje estos necesaj, sintaksaj ŝanĝoj, neniam.

Volitivo

Sub la influo de la naciaj lingvoj, volitivo kun "ke", t.e., kiel subjunktivo, estas tro ofte kaj nekonvene uzata. Pri ĝia uzo nenion klarigas la 6-a Fundamenta regulo, kiu diras nur: "la modo ordona akceptas la finiĝon -u". Kaj pasis preskaŭ jarcento! Kiel ĝia nomo indikas, volitivo esprimas nur volon, ne realan aŭ eblan okazaĵon. Memoru tion ĉiam!

Ĝustan, simplan regulon formulis antaŭ multaj jaroj la akademiano D-ro Walter Lippmann..., sed, ho ve!, ĝi estas ne konata aŭ ignorata:

"Nur se la subpropozicio estas ĉefigita kaj ankoraŭ postulas -u, ĝi havu -u."

Ekzemploj:

Mi deziras ke vi venu. = Venu; tion mi deziras.

Mi helpas vin por ke vi sukcesu. = Sukcesu! Por tio mi helpas vin.

Mi bezonas ke vi subtenu min. = Subtenu min; mi tion bezonas.

Jen tre utila gvidilo, el Plena Gramatiko, iom modifita:

Post la volo kaj deziro,
peto kaj ordona diro,
kaj instigo kaj permeso
kaj devigo kaj neceso,
kaj post verboj celsignifaj,
sekvias formoj subjunktivaj.

Ĝenerale la uzo de volitivo dependas de la vola signifo de la precipa verbo, sed post kelkaj, kiuj per si mem ne esprimas volon kaj kiuj en indikativo sekvigas indikativon, en la ceteraj modoj - infinitivo, volitivo kaj kondicionalo - oni devas uzi volitivan, pro tio ke ili prezentas la sekvantan agon nur dezirata, ne realiĝanta. Tiaj verboj estas: fari, atingi, lasi, toleri, eviti, helpi, meriti, plaĉi, k.a.

Ekzemploj:

Fine mi atingis ke li prenis la kvitancon.(Z).-- Mi penas atingi (atingu, vi atingus) ke la esperantistoj akceptu miajn naŭ plibonigojn.(Z) -- La pluvo faris ke ĉio kreskis multe. Eĉ la plej forta deziro ne povas fari tion, ke menso ne instruita penetru en la misterojn de la scienco.(Z)

Post aliaj verboj (imagi, pensi, atesti, montri, pruvi, rimarki k.c.), eĉ se nur image, la ago aperas ĉiam realiĝanta; tial uzendas indikativo.

Ekzemploj:

Kampanjo de AMNESTIO INTERNACIA kontraŭ torturado

En oktobro 1983 AMNESTIO INTERNACIA adoptis la ĉi-suban dekdu-punktan programon kiel parton de sia tutmonda kampanjo kontraŭ torturado.

Unu el la ĉefaj celoj de ĉi tiu kampanjo estas la efektivigo de la dekdu-punkta programo. Tial Amnesty Internacia apelas al organizaĵoj, personoj kaj speciale al registaroj akceli ĉi tiun efektivigon. Oni povas plej trafe difini la programon kiel "dezirliston" de paŝoj kiujn devus fari registaroj en landoj kie torturado hodiaŭ okazas. Se ĉiuj registaroj observos ĉi tiujn dekdu punktojn, torturado malaperos de la terglobo.

1) Registara kondamno de torturado

La plej altaj aŭtoritatoj de ĉiu lando devas esprimi sian absolutan malakcepton de torturoj. Ili devas komprenigi al tiuj kiuj estas ŝarĝitaj per konservado de la leĝo, ke torturado estos neniel tolerata.

2) Limigo de la daŭro de inkomunikado-reteno

Torturado ofte okazas kiam la viktimoj estas retenataj en "inkomunikado", t.e. ke dum la tempo de la inkomunikado-reteno ili ne rajtas havi kontakton kun personoj ekster la prizono kiuj povus helpi ilin aŭ eltrovi kio okazas al ili.

Ĉiu registaro devas garantii ke inkomunikado-enŝlosado ne prezentas eblon por torturado. Tial estas ekstreme grava ke oni konduku ĉiun kaptiton antaŭ juĝan instancon tuj post lia/ŝia enŝlosiĝo kaj rapide kaj regule permesu al parencoj, advokatoj kaj kuracistoj viziti lin/ŝin.

3) Ne sekreta retenado

En iuj landoj torturado okazas en sekretaj centroj, ofte post "malapero" de la viktimoj. Registaroj devas zorgi ke kaptitoj estu retenataj en lokoj oficiale rekonitaj kaj ke parencoj kaj advokatoj disponu precizajn informojn pri la restadejo.

4) Garantioj dum pridemandado kaj retenado

Registaroj devas regule kontroli la plenumon de la proceduroj pri retenado kaj pridemandado. Oni devas tuj informi ĉiujn kaptitojn pri iliaj rajtoj, inter

ANALIZA GRAMATIKA (fino)

Mi komprenis, mi imagas (kompreni, komprenu, oni komprenus -- imagi, imagu, mi imagus) ke ŝi estas sava anĝelo.

L. Mimó

kiuj ankaŭ la rajto plendi pri la traktado. Sendependaj instancoj devas regule viziti reten-centrojn por inspektado. Se retenado kaj pridemandado apartenas al la respondeco de la diversaj instancoj, tio estus grava garantio kontraŭ torturado.

5) Sendependa ekzamenado de informoj pri torturado

Registaroj devas zorgi ke nepartieca kaj fidinda ekzamenado estu farata pri ĉiaj plendoj kaj informoj pri torturado. Oni devas publikigi la metodon de ekzamenado kaj ties rezultojn, kiel ankaŭ sekurigi plendantojn kaj atestantojn kontraŭ timigo.

6) Nevalideco de konfesoj eldevitaj per torturado

Registaroj devas zorgi ke konfesoj aŭ alia pruv-materialo kiun oni eldevigis per torturado, neniam uziĝu en juĝaj proceduroj.

7) Leĝa malpermeso de torturado

Registaroj devas zorgi ke torturado estu leĝe malpermesita kaj punebligita. Konforme al la internacia juro la malpermeso de torturado neniam devas esti prokrastata, ankaŭ ne pro sieĝostato aŭ kiu ajn alia kriza situacio.

8) Persekutado de torturistoj

Personoj kiuj mem torturis aŭ sub kies respondeco oni torturis, devas esti juĝataj. Ĉi tiu principo devas validi nekonsidere la lokon kie troviĝas ĉi tiuj personoj, nekonsidere kie la krimo okazis kaj nekonsidere la naciecon de kulpuloj kaj viktimoj. Ne devas ekzisti "rifuĝejo" por torturistoj.

9) La trejnado de funkciuloj

Dum la trejnado de ĉiuj funkciuloj engaĝitaj en gardado, pridemandado aŭ traktado de kaptitoj, oni devas emfaze komprenigi ke torturado estas krimo. Oni devas atentigi ilin ke ili estas devigitaj malakcepti kian ajn ordonon torturi.

10) Kompensado kaj rehonorigo (rehabilitacio)

Viktimoj kaj tiuj kiuj dependas de ili devas rajti pri kompenso. Viktimoj povu disponi la bezonatan medicinan zorgon kaj/aŭ la eblojn de rehonorigo.

11) Internacia resonado

Registaroj devas utiligi ĉiujn disponeblajn kanalojn por uzi sian influon ĉe tiuj registaroj kiujn oni kulpigas pri torturado. Oni devas krei kaj uzi interregistarajn mekanismojn por rapide ekzameni informojn pri torturoj kaj por efike agi kontraŭ ilin. Registaroj devas zorgi ke nek trejnado de militista, polica aŭ sekureca personalo, nek transdono de kono stimulu la aplikon de torturado.

12) La ratifiko de internaciaj traktatoj

Ĉiuj registaroj devas ratifiki internaciajn traktatojn kiuj donas garantiojn kontraŭ torturado kaj samtempe la rimedojn por kontraŭbatali ĝin. Tio ĉi aplikigas speciale pri la Internacia Traktato pri Civitanaj Rajtoj kaj Politikaj Rajtoj inkluzive de la apartena Fakultativa Protokolo, kiu reguligas la individuajn plendrajton.



La 20a Kataluna Kongreso de Esperanto

Ĝi okazos en la urbo OLOT de la 12a ĝis la 14a de oktobro 1984.

La 24aj Internaciaj Floraj Ludoj okazontaj kadre de la Kongreso havos kiel festparolanton D-ron André Albault, Prezidanto de la Akademio de Esperanto, kaj la Internacia Arta Vespero prezentos la Ŝtatan Popularan Teatron en Lodzo (Pollando) kaj la hungaran pupartiston Roberto Banky. Aliaj interesaj programeroj riĉigos la nunjaran kongreson de la Katalunoj.

Kompletan programon kaj aliĝilon (aliĝo senpaga por eksterlandanoj) petu rekte de : Llibert Puig, ĝenerala sekretario de K.E.A., Poŝtkesto 290, SABADELL (Katalunio) Hispanio.

Nova E-bulteno en Katalunio

"Tramontano" estas la nomo de la trimonata bulteno de Kultura E-Centro de Perpinjano (adreso : 72 av. Général de Gaulle, F 66000 PERPIGNAN). La 2 jam aperintaj numeroj montras ĝin almenaŭ trilingva : esperanta, franc-lingva kun iom da kataluna. Bonvenon !

Bonvenon ankaŭ al "La humanisto" !

Temas pri "Bulteno por libera diskutado pri humanismaj demandoj". La unua numero estas provo. La sekvonta aperos post la respondoj kaj kontribuoj de la interesataro. Adreso : Esperanto-Centro Humanismo, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6738 Elmstein.

Deziras korespondi : Du bulgaraj junuloj 15- kaj 18-jaraj. Adreso : Vasil KIRILOV BRICEV, str. Bajron 9, BG-4600 VELINGRAD

La Federacio Langvedoko-Rusiljono invitas vin al pikniko dimanĉon 23an de septembro, 114 rue de l'Aniel en Maraussan (je 7 km okcidente de Béziers). Alporti tagmanĝon kaj kovrilon. Renkontiĝo kun esperantista familio el Alasko, kiu navigos tiam sur la "Kanalo de l'Sudo". Posttagmeze, ekskurso al Colombiers kaj Ensérune...



Ekde la 6a de aŭgusto 1984 (datreveno de la atombomba eksplodigo super Hiroŝimo) el diversaj francaj regionoj komenciĝis pacistaj marŝadoj, kiuj intermiksiĝis en Parizo fine de aŭgusto. La celo de tiu agado estas la sama kiel tiu de la pasintjara "Internacia Fastado por la Vivo": Haltigi la vetarmadon kaj la homan malsaton.

Temas pri neperforta agado, kiu volas konsciigi la plimulton pri la nuna monda situacio kaj informi pri Neperforto.

Oficiale, en ĉiuj dokumentoj kaj afiŝoj, inter 18 asocioj kaj grupoj, kiuj

respondas pri tiu manifestacio, estas la Pacista Frakcio de SAT.

La marŝado, kiu ekiris de Biscarosse, trafis Bordozone la 9an de aŭgusto. Ŝajnas al mi, ke estis neesperbla, ege bonŝanca okazo por SAT-kongresantoj "fizike" partopreni en tiu agado, eĉ dum nur kelkaj horoj, samtempe por atesti pri solidareco kaj por konatigi la E-medion al la marŝantoj... Mi renkontis bordozeajn marŝantojn en Sarlat, kiam ili eniris la Tuluzan marŝadon. Mi tuj petis informojn pri eventuala renkonto kun la SAT-esperantistoj. Bedaŭrinde tio ne okazis...

Ĉar mi marŝadis dum dek tagoj, mi scias, ke "ni" maltrafis belan okazon. Mi plurfoje havis okazon, eblecon, konatigi E-on dum la marŝado. Laŭlonge de la vojo, multaj nekonataj personoj elkore akceptis nin, partoprenis en la vesperaj inform- kaj debat-kunvenoj, akompanis nin dum kelkaj kilometroj. Estis instruplena kaj fruktodona travivaĵo, modesta sed esperplena, kaj mi ŝatus, ke ĝin travivu mem multaj E-gekamaradoj.

La 1-an de septembro, rendezuo en Parizo (Place des Invalides).

Estus tre bona financa subteno sendota al : Marche de la Vie, BP.110, F 44004 Nantes Cedex. Poŝtkonto : Gossart Guy, 387791 W Nantes.

Ĝis ! Nicole D.

SAT-Junulfako eldonis... serion el 8 diversaj poŝtkartoj. Dekstre, ni represas du el ili. Tiuj pk. estas mendeblaj ankaŭ ĉe SAT-Broŝurservo (prefere mendu broŝurojn samtempe!) laŭ jenaj kondiĉoj : Ĉiu : 1,50 FF. Por pli ol 10, ĉiu : 1,20 Por pli ol 50, ĉiu : 1 FF. Se vi samtempe mendos broŝurojn, vi ne pagos la afrankon.



ESPERANTO



Komence de junio naskiĝis la PERIGORDA E-GRUPO !

Sabaton 23an kaj dimanĉon 24an de junio, la grupo prezentis budon en la Unua Sabato pri amatoreco, bonvolemo, kreivo, en la festa palaco de Perigozo. Sekve, aperis lunde en loka gazeto "Dordogne libre" artikolo pri Esperanto kaj naskiĝo de la grupo. Tre favora! Ni profitis ankaŭ la SAT-kongreson en Bordoza por propagandi pri E pere de la lokaj gazetoj kaj radioj en la monato Julio. J.G.

Krizo de MONATO finita ! La prestiĝa magazino ne ĉesos aperi.

Por garantii ĝian daŭran ekziston, necesas ke ne nur laŭeble multaj individuoj abonu ĝin, sed ankaŭ ĉiu loka klubo kaj grupo, ĉar per MONATO ĝi disponas pri bonega, konvinka kaj ĉiam aktuala propagandilo. Krome ĉiu racie pensanta kurs-gvidanto dum kaj ĉefe fine de kurso forte rekomendos la magazinon al la lernantoj, ĉar per MONATO ili ne nur havas tre taŭgan materialon por perfektigi en Esperanto sur ĉiuj kampoj de moderna vivo, sed ankaŭ vidos ke Esperanto estas utila. Tiel oni povas vivteni intereson pri la internacia lingvo ankaŭ ĉe tiuj personoj, kiuj ne ŝatas "movadumi". MONATO estas ankaŭ tre valora helpo al vigliganta Esperanto-movado en triamondaj landoj; por ili ekzistas speciala Abonhelpa Fonduso, kiun povas nutri ankaŭ Esperanto-kluboj en pli riĉaj landoj.

Petu inform-materialon de

MONATO, Frankrijklei 140, B-2000 ANTWERPEN, Belgio

(el cirkulero dissendita al E-revuoj kaj radiostacioj)

Plu plagas persekutado kontraŭ bahaanoj en Irano

BADILLAH SAMIMY, UEA-delegito kaj membro de Bahaa E-Ligo mortis en irana policistejo. Mankas novaĵo pri lia edzino kaj lia frato, ankaŭ geesperantistoj. La fundamentaj principoj de la Bahaa religio estis formulitaj de Baha'u'llah' antaŭ pli ol centjaro :

- 1) Unueco de la homa speco. 2) Sendependa esploro de la vero.
- 3) La bazo de ĉiuj religioj estas nur unu. 4) Forigo de ĉiu ajn antaŭjuĝo.
- 5) Religio estu kaŭzo de unueco. 6) Religio akordu kun scienco kaj racio.
- 7) Rajtoj egalaj por viro kaj virino. 8) Universala paco. 9) Universala edukado.
- 10) Spiriteca solvo de la ekonomiaj problemoj. 11) Universala helpa lingvo. 12) Internacia Tribunalo pri Justico.

Bahaa Esperanto-Ligo, Poŝtkesto 289, BR-60000 Fortaleza, Ceara, Brazilo.

La Kalendaro de S.I.A. por 1985 (Solidareco Internacia Antifasiŝma) pritraktos la historion de la sinsekvaj amasaj ekziliĝoj, kiujn suferis la Homaro en sia tuto, iam pro rasaj persekutadoj kaj alioĉaze sekve de la ekregado de tiranoj aŭ de grupoj ideologie malamikaj al malplimulto, kondamnita al morto aŭ al forkuro. Kiel kutime esperantistoj trovas resumon en Esperanto de tiu dokumento, kiu estas publikigita en franca kaj kastilia lingvoj.

Mendi ĉe : S.I.A., 4 rue de Belfort, F 33000 TOULOUSE

Brosurservo de S.A.T.

(samaj adreso kaj poŝtkonto kiel "Laŭte!")

Tiu servo celas etkoste eldoni diversajn manuskriptojn kaj reldoni elĉerpitajn tekstojn. Eventuala profito utilas por financi sekvontajn eldonaĵojn. La servo ne povas pagi al aŭtoroj aŭ tradukintoj. Informoj pri vivo de la broŝurservo regule aperas en la bulteno "**Laŭte!**". Ĝisdatigitan prezliston kun specimeno de "Laŭte!" oni povas ricevi kontraŭ 1 irpk.

Mendoj kaj afranko : La prezoj, en francaj frankoj, inkluzivas la afrankon por minimume 75-franka mendo. Se vi mendas per malpli ol 75 FF :

* se via pago akompanas la mendon : aldonu 20 % por la afranko.

* se vi pagos post ricevo de fakturo : vi pagos la realan afrankkoston.

Abonoj : Kontraŭ minimume 100-franka provizo, vi ricevos aŭtomate ĉiujn novajn broŝurojn kun 20% da rabato + **Laŭte!**, ĝis elĉerpigo de via monprovizo. Pri la stato de via konto vi ricevas informon ĉiun jarfinon kaj kiam ĝi estos baldaŭ elĉerpita.

Vian konton vi kompreneble povas uzi ankaŭ por viaj eksterabonaj mendoj.

Por fariĝi mem disvendanto de SAT-broŝuroj : * Sur mendilo starigu la liston de la broŝuroj, kiujn vi intencas disvendi.

* Ne antaŭpagu : vi pagos nur post la disvendado kaj povos konservi 20 % el la enspezo por vi aŭ via klubo. La nevenditaĵojn vi povos konservi por venonta vend-okazo.

Libroservoj kaj abonantoj ne pagas la afrankon, kiam ili mendas por pli ol 75 FF, kaj ĝuas krome 20% da rabato.

abonilo/mendilo al SAT-BROŝURSERVO "LAŬTE!"

Adreso : Cercle amical espérantiste de l'Agenais
F 47340 LAROQUE TIMBAUT

Poŝtkonto : 3371 74 M Bordeaux (sama adreso)

Ĝiriloj aŭ ĉekoj profite al :

CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS

Mia adreso :

Por la adresaro de "Laŭte!" (nedevice!) :

Naskiĝjaro : Profesio :

Ŝatokupoj kaj deziroj :

Mi abonas por 1984 (20 FF) →

al por 1985 (25 FF) →

"LAŬTE!" de julio 84 ĝis dec.85 (35FF) →

Mi samtempe abonas al "Laŭte!"

+ al la broŝura serio ekde nun

(minimuma monprovizo : 100 FF)

Mi mendas broŝurojn (dorsflanke)

por mi

kiel disvendanto

(vd. apartajn kondiĉojn)

Mia broŝurmendo sumas →

Kiel abonanto de "Laŭte!",

se mi mendis por almenaŭ

75 FF, mi deduktas 20 % →

Restas pagenda →

S U M E

Mi pagas per monbileto(j)/poŝtĝiro/

bankĉeko/respondkuponoj/neuzitaj

francaj poŝtmarkoj/.....

Dato kaj subskribo :

Kelkaj informoj pri la dumonata
informilo kaj esprimilo "LAŬTE!"

Laŭte! estas verkata de siaj abonantoj
mem, redaktata, administrata kaj eldonata
de "Amika Esperanto-Rondo Agenia"
(grupo de SAT-amikoj en suda Francio)

Adreso : Cercle amical espérantiste
de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut

Poŝtkonto : 3371 74 M Bordeaux (sama adreso)

Laŭte! estas libera tribuno uzebla de
ĉiu abonanto. La abono estas ligita
al nenia aniĝo.

Laŭte! estas samtempe informilo, esprim-
ilo, debato, interrilato. Ĉiu abonanto
povas aperigi ion ajn, pri iu ajn temo,
sen cenzuro.

Kelkaj el la temoj jam pritraktitaj
en debatoj : "Kiu estonteco por Esp-o?", "Armado"
"Strukturoj de la E-movado", "Mortpuno", "Ĉu
bankrotis racio?", "Ĉu mita proletara revolucio?"
"La virina problemo", "Maljuneco kaj Esperanto",
"Memmortigo kaj eŭtanazio", "Nacio", "Kiel vivantigi
E-gazeton?", "La modo", "Kiel aktivaj por plu agiti?",
"Soleco, emo al soleco", "Laboro, sendungeco,
rajto je pigro", "Baza Esperanto, ĉu por ĉu kontraŭ?
ktp.

Ĉiu ricevas ĉiujare ĝisdatigitan Adresaron
en kiu ŝi/li rajtas aperigi personajn
informojn kaj apartajn petojn.

Laŭte! nur esceptokaze aperigas tradukojn.
Literaturaĵoj, kiuj pro sia amplekso
ne povas aperi en la bulteno, estas
bonvenaj en la broŝura serio.

Perantoj

Por aboni en landoj, de kiuj eblas sendi
poŝtĝirojn al Francio, prefere ĝiri rekte.

Aŭstralio : Vlado KOSEF

58 Green St, COBAR, N.S.W. 2835

Britio : Libroservo de SATEB

Japanio : MINE Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16,

TAKASAGO, Hyogo-ken, 671 01

Svedio : Pelle PERSSON, Svartviksv. 14,

123 52 FARSTA (pêk 684161-3)

ĈIAM PLI "LAŬTE"...SED IOM MALPLI BROŜURE

"LAŬTE!" en 1985

La nombro de abonoj por Laŭte en 1984 estas 382 (368 en 1983) kun ĉiam progresanta proporcio da nefrancaj legantoj (32% en 1983, 35% nun). Nur iom plialtiĝis la afrankokosto, sed multe pli draste (40%) la prezo de la papero - la ĉefa faktoro en niaj elspezoj. Sendado de L! al eksterfrancia abonanto kostas jare ĉ. 5 FF pli ol sendado al leganto loĝanta en Francio. Do ankaŭ la "internaciigo" de nia bulteno trudas plialtiĝon de la abono.

La venontjara abonprezo de "Laŭte!" - de nun aplikebla - estas do fiksita je 25 FF.

Kompense, versajne aperos pli da dikaj numeroj ol antaŭe, kaj "Laŭte!" eble meritos iom post iom la nomon "revuo", kiun oni kutime tro fanfarone uzas en Esperantio, ĉu ne? Kaj nun ni kune revu:

Ĉu iam monata "Laŭte!" ?

Laŭtulo ĵus levis tiun demandon.

El la malnova projekto pri internacia, ofsetita, monata L!, nur la ĉiumonatiĝo ne efektiviĝis. Sed ĝi ne estas forgesita.

Ĝi postulus:

- * preskaŭ duobligon de la abonprezo: ĉu ĉiuj nunaj gelaŭtuloj konsentus pli elspezi?
- * regulan alvenon de pli da kontribuoj. Kvankam relative multaj gelegantoj kontribuas al L!, certe ekzistas ĉe multaj el la ĝis nun "skribe-mutaj" bezonoj esprimiĝi, kiu ankoraŭ ne manifestiĝis. Alia fonto de redakta materialo povus esti tiuj tekstoj normale destinitaj al la broŝura serio (tro mallongaj aŭ facile "felietonigeblaj") pri kiuj mi ĉi-antaŭe aludis.
- * pli da laboro fare de la redakt-, administr-, presanto, kiu ja estas unu nura persono nur dubraka. Necesus do helpo de unu surloka persono almenaŭ 1 fojon ĉiumonate, ekzemple semajnfino. Kiu konsentus tion oferi?

Kompreneble, tiuj kondiĉoj devus esti plenumitaj samtempe kaj sufiĉe firme, kun versajne eta provtempo, antaŭ ol ni definitive decidu tiun progresigan paŝon.

Kribo

Ĝen ĵus alvenis tiu ĉi sugesto:

Kiel ĝi naskiĝas

En du numeroj de Laŭte, Kribo klarigis por ni, kiel li nask-

igas nian revueton. Tio estis tre interesa. Sed mi deziras proponi alian informmanieron, kiu povus interesi kelkajn - ne tro multajn, mi esperas - legantojn de "L" : dum unu semajno Kribo organizus por deko da legantoj staĝon de gazetlaboro. La staĝanoj dormus en proksima herbejo kun siaj tendoj, kaj kune pretigus sian manĝaĵon (tio por la materiala parto de la afero); kaj por la laboro, ni - ĉar mi esperas partopreni tion - farus de A ĝis Z tiun laboron, kiun Kribo faradas por ni, sesfoje jare. Eble en somero '85 ? Mi devas konfesi, ke mi multe dezirus konatiĝi kun nia samideanino JULIA !

Paŭlo

Tiu ĉi sugesto estas tre subteninda! Mi tuj registras Paŭlon kiel la unuan el la staĝanaro por somero 1985. Efektive, plurajn sukcesajn somerojn jam okazis E-semajno en Laroque (aŭ Beauville, je 10 km-oj) kaj tiel ekzemple naskiĝis la unua rondo de ĉenleteranoj, kiuj certigis al L! unu el ties plej firmaj bazoj. Okazis ankaŭ kunlaborado por paperfaldado, paĝordigado, ktp, sed ĉefe por broŝuroj. Cetere, tiu kunlaborado plu okazas de tempo al tempo dum la jaro fare de du-tri personoj : BGD, Nicole, Ljo (kiu "kulpas" la nunan fronttitolon de L!), k.a.

La pretigado de unu numero de L! efektive postulas almenaŭ tutan semajnon da laboro, sed dekope oni certe ne laborus pli bone ol trio, precipe ĉe JULIA, kaj ĉe la ofsetilo (ankoraŭ ne kromnomita), kiu sidas en tiel eta ĉambro, ke nur unu persono povas ĉeesti! Nur la redaktadon (= lingvokontroladon) oni ne povas ellerni en ununura semajno, sed por tio mi volonte helpas.

Estas surloke disponeblaj almenaŭ 2 dormlokoj en bangalo kaj 1 en eta tendo. Du aŭ tri pliaj volontul(in)oj estos do bonvenaj, ekzemple por la lasta semajno de aŭgusto aŭ la unua de septembro 1985.

Bonvolu skribi al

Kribo.

La venonta numero aperos fine de novembro 84.

VIA SITUACIO

rilate al "Laŭte!" :

La n° 57 finos
vian abonon

* Abono registr-
ita ĝis dec.85

* Automate estas plilongigita la abono de tiuj, kiuj posedas sufiĉe da
mono en sia konto. Por iĝi kontposedanto provizi per minimume 100FF.

kiel "kont"-posedanto :

En via { restas
konto { mankas
(-)